En la jaro1997 aliĝo al ILEI kaj ĝia sekcio en Irano -IRLEI- la instruadon denove jam kaŭzis de antaŭ 8 jaroj kiel gvidantino de korespondaj kursoj. Tra la Irano mi havis gelernantojn, en la sudo, nordo, okcedento kaj orienta partoj kaj nun povas diri ke fakte mi estas feliĉa, ĉar povas honori al ili inter kiuj forte flamis entuziasmaj aktivuloj. Ekz Said Borhani mia inteligenta lernanto en la direkto de UEA projekto "la lingvo de Paco" okupis instrui E-on al afganaj rifuĝintoj en sia urbo Maŝhado progrese kaj eĉ en sia universitato kiam estudentoj okazis pere de li. La alia estas Said Sardari kiu en Kerman-universitato kursojn aranĝis.

Antau tri jaroj kiam "IRANA ESPERANISTO" ricevis ŝtatan permesilon por aperi kiel sezon-revuo Esperanto-persa, mi klopodis havi rolon ankaŭ ĉi-terene kaj nun de tempo al tempo faras iajn helpetojn diversmaniere al redakcio.

Ĉi-jare mi jesis helpon al majstro s-ro Azari pri lia alia vortaro Persa-Esperanta kaj ankaŭ akceptis la respondecon en IREA (Irana E-o Asocio) kiel ĝenerala sekretario kaj esperas bonajn agadojn tiu-ĉi kampe. ★

Omaĝe al viktimoj de Cunamio

Jam nelonge la Cunami-katastrofo forprenis pli ol ducentmilojn da niaj samglobanoj kaj senhejmigis aliajn kelkmilionojn. La redakcio de *Irana Esperantisto* esperimas sian profundan kondolencon, precipe al la esperantistoj de afektitaj landoj.

به یاد قربانیان تسونامی

چندی پیش فاجعه تسونامی بیش از دویست هزار نفر از ساکنان کره زمین را از بین برد و چند میلیون نفر را بی‌خانمان کرد. هیات تحریریه پیام سبزاندیشان ضمن تسلیت به بازماندگان این حادثه به‌خصوص اسپرانتودانان، مراتب تاسف عمیق خود را ابراز می دارد.

Kial ankaŭ vi?

Ho l' afabla maro!
Ankaŭ vi kaj kreo de infero!
Ni alkutimiĝis al furiozoj de l' tero,
kiam tertablo tremas de kolero,
falinte rompiĝas glas' kaj telero
kaj estingiĝas nia vivkandelo,
Aŭ kiam vulkano vomas sur ŝia mantelo,
kaj kovras la sur ĝi belajn desgnaĵojn.
Ni alkutimiĝis al furiozoj de l' ĉielo,
kiam ĝi tiom multe drinkigas nin
ke nin dronigas ties pluvo-vin',
kaj alitempe tiom ĝi avaras al ni
ke soifo kaj malsato mortigas nin.
Sed vi, l' aminda maro,
kiu nutris nin ĉirkaŭ via tablo,
kaj plezurigis nin per via afablo,
kaj nur malofte kaj milde
vi nin turmentis kiel diablo,
Ni ja ne atendis,
ke viaj ondoj ataku je tia abundo,
ke en niaj hejmoj venu via inundo,
ke nia ĉieso iru al via fundo,
ke aperu sur homara korp' tia vundo,
Ho la maro! Kial ankaŭ vi?

(d-ro) Kejhan Sajjadpur

چرا تو هم؟

ای دریای مهربان!
تو نیز جهنم می‌سازی!
ما به خشم زمین عادت کردیم،
وقتی میز زمین از عصبانیت می‌لرزد
لیوان و بشقاب می‌افتند و می‌شکنند
و شمع عمر ما خاموش می‌شود.
یا وقتی آتشفشان روی لباس خود قی می‌کند
و طرح‌های زیبای روی آن‌را می‌پوشاند.
ما به خشم آسمان عادت کردیم،
وقتی آن‌قدر از شراب باران خود به ما می‌دهد
که ما را خفه می‌کند،
یا آن‌چنان بخل می‌ورزد
که ما از گرسنگی و تشنگی تلف می‌شویم.
اما تو، دریای دوست داشتنی
که ما را دور سفره خود مهمان می‌کردی
و با مهربانی خود ما را نوازش می‌کردی
و فقط گهگاه و خفیف
ما را مثل شیطان می‌آزردی،
ما انتظار نداشتیم
که امواجت چنان وحشیانه حمله کنند
که سیل تو وارد خانه‌هایمان شود
و هستی و نیستی ما را به اعماق تو ببرد
و آن‌چنان زخمی بر پیکر بشریت بگذارد.
ای دریا چرا تو هم؟

دکتر کیهان صیادپور (ترجمه به فارسی از اصل اسپرانتو)







Noŭruzo

Ali Koŭsari

Okaze de la irana jarnoviĝo (21-an de marto), ĉinumere ni prezentas artikoleton pri noŭrozo kaj ĝiaj diversaj ceremonioj. Espereble ĝi donos al vi sufiĉe montrivan bildon pri la multmil-jara tradicio de Irano. La red.*

Enkonduko kaj historieto

La komenciĝo de la nova jaro estas grava afero ĉe ĉiuj nacioj. Tial ĉiuj landoj kaj nacioj festas ĝin dum tagoj. En Irano la novjarfesto nomiĝas "Noŭruzo" kies signifo en la Persa lingvo estas "Nova tago". Ĝi estas plej grava, populara kaj antikva festo tra Irano. Verŝajne nur en Irano "Noŭruzo" estas oficiala festo; tamen oni festas ĝin ankaŭ en iuj partoj de landoj kaj nacioj kiel Afganio, Taĝikio, Irako, Turkio, Uzbekio, Kazaĥio, Ĉinio, Azerbajĝanio … kaj resume lokoj kie fluas la irana kulturo .

Pri la deveno de "Noŭruzo" oni esprimas diversajn opiniojn. Iuj opinias ke persa mita reĝo, nome Ĝamŝid unua-foje kreis Noŭruzon, ĉar en tiu tago li sukcesis venki siajn malamikojn. Kaj iuj opinias ke Noŭruzo rilatas la religion Zoroastrismo.

Historiistoj opinias ke antaŭ 3000 jaroj; oni festis Noŭruzon en Grekio, Egiptio, Hindio kaj du malnovegaj landoj Kaldeo & Asirio.

Do Noŭruzo estas praa festo; kiu eventuale kreiĝis dum la tempo de irana profeto Zoroastro antaŭ 3000 jaroj.

Pri la deveno de "Noŭruzo" oni esprimas diversajn opiniojn. Iuj opinias ke persa mita reĝo, nome Ĝamŝid unua-foje kreis Noŭruzon, ĉar en tiu tago li sukcesis venki siajn malamikojn. Kaj iuj opinias ke Noŭruzo rilatas la religion Zoroastrismo.

Oni kredas ke la origino de "Noŭruzo" samtempas kun iuj gravaj eventoj i.a. tago en kiu Dio kreis la mondon, tago kiam la profeto Abrahamo detruis la idolojn kaj tago, kiam la Islama profeto Mohammad (Mohamedo) elmigris (en tiu tago komenciĝas la islama).

Do kiam ni diras la jaro 1384, tio signifas ke laŭ la irana sunkalendaro pasis 1384 jaroj de la elmigro de la profeto Mohammad. La menciitaj kredoj, ĉu ĝustaj ĉu malĝustaj, montras ke Noŭruzo estas sankta kaj grava okazaĵo.

Astronomie Noŭruzo samtempas unuan tagon de la sezono printempo, kaj komenciĝon de printempa ekvinokso.

La festo de Noŭruzo samtempas 20-an aŭ 21-an de marto ĝis la 1-a aŭ 2-a de aprilo. (laŭ la irana kalendaro de la 1-a ĝis la 13-a de la monato Farvardin). La diferenco dependas de tio, ke ĉu temas pri jaro ordinara (365 tagoj) aŭ supera (366 tagoj). En Irano loĝas diversaj nacioj kaj ili festas Noŭruzon diversmaniere. Tamen troviĝas komunaj ceremonioj kaj trajtoj inter ili. Resume mi mencias iujn ceremoniojn.

Antaŭ-Noŭruza Dompurigado.

2-3 semajnoj antaŭ Noŭruzo oni (ordinare la patrinoj) purigas domon, meblaĵojn de la domo, vestojn kaj ĉiujn domobjektojn, Kaj levas ĉiujn leveblajn meblojn kaj forigas malpuraĵojn.

Ĉar Noŭruzo estas simbolo de refreŝiĝo, reverdiĝo, renaskiĝo kaj renoviĝo de la naturo, tial omaĝe de Noŭruzo ĉiu kaj ĉie purendas kaj purindas.

Astronomie Noŭruzo samtempas unuan tagon de la sezono printempo, kaj komenciĝon de printempa ekvinokso.

Aĉetado

Post la dompurigado venas alia ceremonio kies nomo estas "Aĉetado".

Tion oni faras ordinare dum la lasta monato de la jaro.

Ja vidindas bazaroj, stratoj kaj vendejoj dum la lastaj semajnoj de la jaro, kiuj ondas kaj plenplenas de homoj kaj speciale geknaboj, kiuj entuziasme aĉetas novajn vestojn, ŝuojn, necesaĵojn kaj bongustajn fruktojn, dolĉajn kukojn kaj nuksojn.

La infanoj tre plezuras kaj plaĉegas ilin la

afero “verdherbaĵo”. Proksimume 3-4 semajnoj antaŭ Noŭruzo oni (la patrino de la familio) preparas la verdherbaĵon, kio simbolas la alvenon de la printempo. por prepari ĝin, oni metas iom da semojn - kiel tritiko aŭ alia graminaco - en la malsekan tukon kaj post kelkaj tagoj, kiam la maceritaj semoj ekburĝonis, oni metas ilin sur ujo kiel tolero kaj la semoj dum paso de la tempo kreskas kaj tiel fariĝas belaj verdherbaĵoj.

Kelke da aliaj ceremonioj

En iuj vilaĝoj kaj urbetoj oni (virinoj) bakas dolĉajn panojn. Tre bongustaj.

Adiaŭi la mortintojn: oni antaŭ finiĝo de la jaro, ne forgesas siajn gekarulojn, kiuj iam vivis kaj loĝis inter ili. Afablaj irananoj antaŭlastan kaj lastan ĵaŭdon de la jaro (do du foje) iras al tombejoj kaj preĝas por ili.
Multaj irananoj ĉiuĵaŭde posttagmeze iras al tombejoj; sed dum tiuj du lastaj ĵaŭdoj de la jaro proksimume ĉiuj iras kaj la tombejoj plenplenas de la homoj.

La merkred-festo: vespere de la lasta mardo de la jaro oni ekbruligas fajregojn kaj saltadas trans ili kantante *"Mia flaveco al vi; via ruĝeco al mi !"*. La fajron oni ne estingas, ĝi mem forbrulu. Tiu ĉi ceremonio estas la simbolo de puriĝo, forigo de malbono, malfeliĉo kaj malsaneco.

Eble ĝi venas el Zoroastrismo, ĉar ĉe zoroastranoj la fajro estas Sankta. Tiu ĉi ceremonio nomiĝas "la Merkred-festo". Oni faras ĝin en la korto de la domoj, stratoj kaj parkoj.



Merkred-feston ŝategas gejunuloj kaj ili plenenergie partoprenas la feston

Lastnokto

La patrinoj preparas bongustan noktmanĝon (i.a. rizon kun legomo kaj fiŝo) kaj oni kiel la "merkredfesto" preparas fajron kaj faras artfajraĵon kaj piroteknik-ludojn.



Merkred-festo
Fotoj de “Irana Studenta Novaĵ-Agento”

Dum Noŭruzo kelkajn horojn antaŭ komenciĝo de la nova jaro, oni sternas tablotukon sur kiu troviĝas Korano (aŭ simila nobla libro), spegulo, verdherbaĵo, dolĉaĵoj, fruktoj, blanka aŭ kolorigita ovo, akvo, brulanta kandelo, fiŝetoj kaj sep objektoj aŭ manĝaĵoj kies nomoj komenciĝas per litero S (en la perslingvo).

Ili diferencas de regiono al regiono. Tamen ofte kaj ordinare estas jenaj:
Monero (sekke)
Vinagro (serke)
Verdherbaĵo (sabze)
Alizo (senĝed)
Sumako (somag)
Ajlo (sir)
Pomo (sib)

La festtablotuko ja estas bela kaj montras iranan animon. Kelkajn minutojn antaŭ alveno de la nova jaro oni vestas siajn novajn vestojn kaj ĉiuj anoj de la familio sidas ĉirkaŭ festtablotuko kaj atendas finiĝon de la kurantjaro kaj alvenon de la nova jaro, dum legas specialan preĝon de la novjaro jene:
“O, transformanto de koroj kaj okuloj
O, kreanto de nokto kaj tago
O, transformanto de fartoj kaj statoj
Plej bone ŝanĝu nian farton”

Oni ofte informiĝas pri la alveno de la novjaro per telavido aŭ radio; kiuj dissendas specialajn festprogramojn. Kiam alvenas la nova jaro ĉiuj familianoj brakumas kaj kisas unu la aliajn kaj esprimas siajn esperojn kaj bondezirojn por la nova jaro.

La unua tago (matene)

Matene de la unua tago oni partoprenas en

ceremonioj, kiuj okazas en moskeoj aŭ domoj por tiuj, kiuj lastatempe forpasis. Oni do komence vizitas familiojn, kiuj lasttempe perdis familianon kaj konsolas ilin dezirante Dian kompaton al la mortintoj.
La funebrantaj familioj kaj iliaj ĉefaj parencoj ne festas Noŭruzon pro funebrado almenaŭ dum unu jaro.

Ĝi nomiĝas "nov-festo". Irananoj tre omaĝas al mortintoj. Krom Noŭruzo kiu estas nacia festo ankaŭ ekzistas kelkaj aliaj religiaj festoj. Kiam iu forpasas oni plenumas



Sep "So"-a tablotuko

ceremonion "nov-festo", kiu okazas en plej proksima festo.

Do la ceremonio por iuj mortintoj okazas dum 1-a tago de Noŭruzo kaj por iuj forpasintoj dum aliaj religiaj festoj.
Iuj dum unua tago de la novjaro iras tombejon kaj preĝas por siaj forpasintoj. Oni ankaŭ ne forgesas malsanulojn kaj vizitas ilin en la domoj aŭ hospitaloj.

La 1-a tago (posttagmeze)
Post alveno de la nova jaro oni iras domon de siaj parencoj, amikoj kaj vizitas unu la aliajn. Alivorte oni gastiĝas kaj gastigas. Sed ne dum unu tago, dum 12 tagoj, do ĉiutage oni vizitas iujn parencojn aŭ amikojn. Oni komence iras domon de la plej aĝa parenco kaj la vizito komenciĝas per irado al la "blankbarbuloj".

Dum la vizitoj oni regalas gastojn per varmtrinkaĵo (teo, kafo…), fruktoj, kukoj, dolĉaĵoj, kaj nuksoj.

La lasta tago
13-an de Farvardin (1-an aŭ 2-an de aprilo) estas la lasta tago de la festo Noŭruzo, kiu nomiĝas "naturtago" aŭ "eksterenigi (pasigi) 13an tagon".

En la perslingvo ĝi nomiĝas "Sizde be dar". Dum jena tago oni foriras de la urboj kaj siaj domoj kaj pasigas la tutan tagon - ofte kun siaj parencoj kaj amikoj - en la naturo



Omaĝe al Noŭruzo
De: M. Karam-od-dini

(ĝardenoj, parkoj, montoj).
La saman tagon oni forĵetas - ofte en la riveron – verdherbaĵojn, kiujn oni preparis antaŭ Noŭruzo por festtabltuko.
Vespere oni revenas siajn domojn, kaj ĉi tiel finiĝas la plej longa festado de la mondo.
Festdonaco de Noŭruzo estas ĝojiga okazo por ĉiuj, specile por infanoj. Dum Noŭruz-vizitoj la plenkreskuloj donacadas monon aŭ diversajn objektojn al ili. Tamen la festdonaco ne nur apartenas al la infanoj.ekzemple la patro de la familio festdonacas al siaj infanoj, edzino. gefratoj, gebofiloj …. kaj inverse. Eĉ la ŝtato festdonacas al siaj oficistoj.

Kelke da aliaj punktoj
Dum 13 tagoj de Noŭruzo la lernejoj kaj universitatoj estas feriaj. La ŝtataj oficejoj nur 4-5 tagojn ferias. Tial multaj preferas vojaĝi dum siaj feriaj tagoj.

Aldone:
-La plej multo de ĵurnaloj ne aperiĝas dum Noŭruzo (bedaŭrinde)?!
-Tuj post alveno de la novjaro la politikaj estroj de la lando festsalutas kaj ilia festmesaĝo dissendiĝas televide kaj radie.
-Radio kaj televido havas amuzajn kaj specialajn festprogramojn dum 13 tagoj.
-Noŭruzo estas praa ceremonio, kiu dum la disvolviĝo de de la historio neniam forgesiĝis kaj ne perdis sian iranan animon.
-Islamo, kiu estas la ĉefa religio en Irano ne nur ne kontraŭstaras jenan feston, eĉ respektas kaj konfirmas ĝin, ĉar ĝiaj instruoj konvenas ankaŭ Islamon.

Mi esperas ke supraj skribaĵoj plaĉu al neiranaj samideanoj, kiujn interesas scii pri "Noŭruzo" festo. Fine mi gratulas la feston ankaŭ al ne-iranaj geesperantistoj, ĉar Noŭruzo estas la festo de komenco de Printempo kaj printempo estas simbolo de verdeco kaj la esperantistoj pensas verde. Tial Noŭruzo apartenas al ĉiuj, kiuj pensas verde kaj amas pacon, belecon kaj naturon. Ĉu ne?

Haĝi-Firuzo Heroldo de Noŭruzo

Hamze Ŝafii



Haĝi-Firuzo estas viro en ruĝaj vestoj kiu iras de strato al strato kantante kaj tamburante kelkajn tagojn antaŭ Noŭruzo, t.e. irana novjarfesto. Li estas kutime akompanata per unu-du kunuloj. Oni diras ke li kaj liaj kunuloj estas simboloj de malnova tradicio en Azarbajĝano, nomita "*Giŝdan Ĉiĥdim*", laŭ kiu Haĝi-Firuzo kantis celante informi homojn pri la alveno de la printempo kaj foriro de la vintro. Interŝanĝe, homoj donas al li donacojn aŭ monon por la bona novaĵo, kiun li alportas.

Haĝi-Firuzo estas persono kun nigrigita vizaĝo kaj ruĝaj vestaĵoj, kiu tradicie simbole heroldas la alproksimiĝon de la printempo. Li komencas vagi tra la stratoj kaj aleoj en sia ruĝa kostumo semajnojn antaŭ la fino de la irana jaro. La sono de liaj kantoj kaj la vidiĝo de lia dancado rememorigas ĉiujn, ke la aromo de Noŭruzo estas en la aero. Haĝi-Firuzo ĉiam estas bonvenata kaj amata karaktero por irananoj.

Harmonie kun la renaskiĝo de la naturo, la irana Nova Jaro, ĉiam komenciĝas je la unua tago – kaj unua sekundo - de la printempo. Tiu tago nomiĝas Noŭruzo (laŭvorte: Novtago). Noŭruz-ceremonioj estas simbolaj reprezentadoj de du antikvaj konceptoj - la Fino kaj la Renaskiĝo; aŭ la Malbono kaj la Bono. Kelkajn semajnojn antaŭ la nova jaro, irananoj purigas kaj rearanĝas siajn hejmojn. Ili havigas al si novajn vestojn, bakas kukojn kaj plantas semojn kiel signo de renovigo. La ceremonia tuko *Sofrej-e Haft-Sin* (laŭvorte: Sep-so-tuko, ĉar ĝi devas surhavi sep aĵojn komenciĝantaj per litero so en la persa) estas aranĝata en ĉiu familio. Ekster la hejmoj la heroldo de alproksimiĝo de Noŭruzo, Haĝi-Firuzo sola aŭ kiel grupo de samtipaj karakteroj klopodas ŝanĝi la ĉiutagan etoson kaj donaci ĝojon al ĉiuj kaj samtempe kolekti iom da mono por si mem. Haĝi-Firuz-karnavaloj konsistas el dancado, tamburado kaj trumpetado por disvastigi bonan kaj ĝojigan novaĵon pri alveno de Noŭruzo. Ili amuzigas homojn per danco, muziko, kantoj, poemoj kaj rakontoj. Haĝi-Firuzo ekaperas dum la lasta monato de la irana jaro, Esfando, por anonci ke jam estas tempo por prepariĝi festi la jarnoviĝon.

Haĝi-Firuzo vagadas de kvartalo al kvartalo, liaj kunuloj anoncas lian alproksimiĝon kun laŭta muziko, li elfaras diversajn komikajn gestojn deklamante amatajn poemojn, kantas popularajn popolkantojn kaj diras folklorajn rakontojn. Haĝi-Firuza ĉefa celo estas ridigi la homojn. Multaj poemoj pri Noŭruzo kaj Haĝi-Firuzo temas pri la feliĉo kion li disvastigemas dum la nov-jara festo. Eble la plej fama kaj konata kanto komenciĝas tiele:

Arbab, arbab, arbabe ĥodam salamo alejkom!
Arbabe ĥodam sareto bala kon!
Arbabe ĥodam boz-boze gandi!
Arbabe ĥodam ĉera nemiĥandi!?
Ho mia mastro, mia propra mastro,
saluton al vi!
Ho mia mastro, levu vian kapon!
Ho mia mastro, suker-farita kapro!
Ho mia mastro, kial vi ne ridas!?

Ĉijara Noŭruzo 1384 komenciĝas dimanĉe la 20-an de Marto 2005 je la 4:03 posttagmeze laŭ tehrana loka tempo. La horo en kelkaj aliaj grandaj urboj estas:

07:33 a.t.m. laŭ Nov-Jorka tempo dimanĉe marto 20, 2005
12:33 p.t.m. laŭ Londona tempo dimanĉe marto 20, 2005
01:33 p.t.m. laŭ Pariza tempo dimanĉe marto 20, 2005
09:33 p.t.m. Tokjo-tempo dimanĉe marto 20, 2005
11:33 p.t.m. Aŭstralia/Novzelanda tempo dimanĉe marto 20, 2005 ★

Noŭruzo

la Irana Novjartago

Multmiljara Tradicio

Ŝima Bastani

Irana aŭ Persa Kalendaro

Persoj aŭ irananoj dum sia longa historio ĉiam gravigis pri kalendaro kaj ties sistemo. Ili estas unu el la unuaj kuturoj, kiuj ekuzis "laŭsunmovan" aŭ pli simple "sunan" kalendaron. Ĝenerale, la suno ĉiam havis tra la historio tre specialan simbolan signifon en la irana kulturo.

La irana kalendaro estas pli preciza ol la gregoria kalendaro, kvankam la lasta ekestis jarcentojn pli poste en 1582 p.K. kaj kvankam ambaŭ ili estas sunaj kaj entenas superjarojn. Dum la 11-a jarcento grupo de iranaj sciencistoj, i.a. Omar Kajjam (ĉ. 1050-1122 p.K.), reviziis la iranan kalendaron, kiu jam ekzistis de miljaroj. Kajjam estas unu el la plej grandaj matematikistoj kaj astronomoj, kiu plej famas en okcidento ĉefe pro siaj mallongaj kvarversaj poemoj, nomataj robaioj. (Liaj robaioj tradukiĝis ankaŭ Esperanten far prof. Gaston Waringhien tre majstre. Bv. vd. noton n-ro 1)

La jaro de irana sunkalendaro komenciĝas precize kiam la suno eniras la nordan hemisferon dum la norda printempa ekvinokso; alivorte kun ekiĝo de la primavero en la norda hemisfero. La kalendaron konsistigas 12 monatoj kun persaj nomoj, kies esperantaj transskriboj estas: farvardino*, ordibeheŝto*, ĥordado*, tiro*, mordado*, ŝahrivaro*, mehro*, abano*, azaro*, dejo*, bahmano* kaj esfando*. La unuaj 6 monatoj enhavas 31 tagojn, la postaj 5 monatoj 30 tagojn, kaj la lasta monato 29 tagojn, se ne temas pri la superjaro, kies-okaze ankaŭ ĝi longas 30 tagojn. La kialo por la unuaj 6 monatoj enhavi 31 tagojn, kaj la aliaj nur 30 tagojn, ne estas arbitra – sed pro tiu fakto, ke la suno moviĝas iomete pli malrapide en la nordaj printempo kaj somero ol en la nordaj aŭtuno kaj vintro.

Noŭruzo, 1-a Tago de 1-a Monato

Noŭruz estas persa vorto ksj laŭlitere signifas "novtago"n. Ĝi estas la unua tago de la unua monato (farvardino) en la irana kalendaro. Noŭruzo estas ankaŭ la novjara festado en Irano, kio ekzistis de almenaŭ 3000 jaroj antaŭe en malnova Persujo. Noŭruzo markas la komenciĝon de la suna jaro. Ĝi estas celebrado de la revekiĝo de la naturo, kio okazas en la unua tago de la printempo en la norda hemisfero. La natura revekiĝo simbolas la triumfon de bono, varmo kaj lumo super malbono, malvarmo kaj mallumo; de printempo super vintro. Noŭruzo estas ekfino de la malvarma vintro kaj ekiĝo de la vigla kaj esperiga printempo – la amsezono. Tiu ĉi simbola kaj poezia ŝanĝo korespondas kun la matematika pozicio de la suno, kiu eliras la zodiakon de la Fiŝoj kaj eniras la zodiakan signon de la Ŝafo, kio ankaŭ famas je la Printempa Ekvinokso.

Hodiaŭ ne nur en Irano, sed ankaŭ en aliaj landoj, kiuj iam estis parto de Persujo kaj/aŭ kie regas la persa lingvo kaj kulturo, oni festas noŭruzon.

Historio de Noŭruzo

La renoviĝado de naturo estas la esenco de tiu ĉi multmiljara tradicio malnova. Multaj kredas ke la iniciatoro de noŭruzo estis Ĝamŝido, miteca imperiestro de malnova Persujo. Lia dinastio nomiĝas Piŝdadidoj. Tamen aliaj kredemas plipostajn Aĥemenidojn (550-330 a.K.) la iniciatintoj

de la plej polulara irana festado noŭruzo.
Tra la tuto de sia ofte-ŝtorma historio, la persaj popoloj pasigis plej malfacilajn kaj mallumajn tempojn nur fortiĝante i.a pri siaj tradicioj kaj kulturo. Fremdlandaj atakoj kaj okupadoj, enlandaj militadoj kaj mondmilitoj k.s. ne malmulte spertitas en Persujo/ Irano. Tamen eĉ konkerintoj – i.a. Aleksandro la granda, aŭ la araboj – ne povis forgesigi al la popolamasoj ilian amatan noŭruz-ceremonion. Tiel, ke eĉ hodiaŭ la plej longan feriadon, oni ĝuas dum la noŭruzo en Irano.

En la antikva persujo, ĉiu tago de la monato havis propran nomon, kaj apartenis al speciala anĝelo. La dektria tago de farvardino, la unua irana monato, kiu komenciĝas per la unua tago de la printempo en la norda hemisfero (21-a de marto), apartenas al pluv-anĝelo, kiun reprezantas ĉevalo.

La Fajrofesto

La noŭruza festtempo konsistas el multaj tre diversaj ceremonioj simbole signifohavaj, kiuj okazas kaj antaŭ kaj post la jarŝanĝiĝo. Eble la plej frua ĉefa ceremonio estas *ĉar-ŝanbe-suri*, t.e. "la merkreda fajrofesto", kio okazas antaŭan vesperon de la lasta merkredo de ĉiu jaro. En la vespero ĉiuj familianoj kune festas la okazon, kiu eble ĉefe temas pri dankado por pasigado de alia vintro sane kaj komenci novan printempon varme ĉe la fajro, kiun oni estigas post la sunsubiro. La fajro, tre sankta en Zoroastrismo – irana religio antaŭ Islamo – havas fundajn radikojn en la kulturo de malnova Persujo. Lumo, ĉu de la suno, ĉu de la fajro, okupas tre gravan lokon en irana mondorigardo. Por la fajro oni utiligas sekajn branĉetaĵojn aŭ lignaĵojn kaj ĉiuj



Noŭruza manĝaĵo

familianoj vice super- aŭ transsaltas fajreton - kaj se temas pri junuloj, ili trasaltas fajregon.



Noŭruzo en Azerbajĝano

Saltante ĉiuj aldiras la fajroflamojn kantece: "Via ruĝo (sano) estu mia; mia flavo (malforto) estu via!"
Alia ritaĵo dum la vespero kaj nokto estas *gaŝog-zani*, t.e. "kuler-frapado": precipe gejunuloj kovrante sin en ĉadoron (surtuton), iras ĉe pordojn de la (najbaraj) domoj kaj frapante kuleron kontraŭ metala bovlo alvokas la domanojn por peti frandaĵon aŭ monon.
Ankaŭ *fal-guŝ*, laŭlitere "angul-fortuno", precipe en pasinto, helpis al oni dum la nokto ekscii ĉu en la novjaro ili atingos al sia dezirato/revo aŭ ne. Ĉefe temis pri knabinoj sciemaj pri sia eventuala edziniĝo venantjare kaj deziruta edzo. La persono staras en malluma angulo, kaj aŭskultemas preterpasantojn. Vortoj, kiujn la preterpasantoj eldiras ĉepasante, klarigos al kaŝita persono pri la fortuno.
Dum la ceremonioj de la nokto se vi manĝas *Aĝile moŝkel-goŝa* (problem-solvajn nuksojn), ili agos … laŭ signifo de sia nomo: simple solvos viajn problemojn! Tion kutime konsistigas diversaj nuksoj, kiel migdaloj, juglandoj kaj pistakoj, kaj sekigitaj fruktoj kiel figoj, perskpecoj, vinberoj kaj daktiloj.

Haĝifiruzo, la Heroldo de Novjaro

Haĝifiruzo* estas persono, kiu nigriginte la vizaĝon, kaj surmetante ruĝan veston (bv. rigardu la kovrilan bildon de la revuo), trairas la stratojn kaj aleojn antaŭ kaj dum la noŭruzo kantante kaj dancante por anonci la alvenantan novjaron kaj ricevi mondonacon de la preterpasantoj. Lin kutime akompanas unu aŭ pli da ludistoj kaj/aŭ dancistoj plejam malgrandaĝaj. Kantaĵojn ĉefe konsistigas gaj(ig)aj kaj eĉ ridigaj poemaĵoj iel rilate al noŭruzo. (bv. vd. apartan artikolon pri haĝifiruzo en tiu ĉi revunumero)


Noŭruzo en Taĝikio

Renovigadoj

Oni sin pretigas por noŭruzo i.a. per detala purigado de la domo, ekz-e lavante tapiŝojn, purigante fenestrojn k.s. kaj aĉetante novajn vestaĵojn, vivilojn kaj meblojn. Dum la unuaj tagoj de la nova jaro ĉiuj iras al la domoj de la familianoj, amikoj kaj najbaroj vestante siajn novajn vestaĵojn kaj gratulante kaj bondezirante al ili pro la nova jaro. Dum la vizitoj plimaljunaj vizitatoj donas donacaĵojn aŭ monsumon al la plijunaj vizitantoj. Ĉiu familio de antaŭe informas la aliajn pri tio, ke dum kiu(j) tago (j) ili restas hejme por regali la vizitantojn. La regalado okazas per diversspecaj dolĉaĵoj – iam hejmfaritaj speciale noŭruz-okaze – kun teo aŭ/kaj siropoj. Certe la vizito ne povas daŭri longe, ĉar temas pri multaj kutime. Oni unue iras al la plej maljunaj homoj, tiele montrante sian elkoran estimon al la aĝuloj. Preskaŭ ĉiu vizitito vizitos la vizitintojn pli poste. Tion oni perse nomas *did-o-bazdid* (vizito-kaj-revizito). Se problemo aŭ malpaco regas inter du personoj aŭ familioj, noŭruzo estas la plej taŭga tempo por repaciĝo: kutime la plijuna aŭ la kulpinto iras al plimaljuna aŭ la kulpito; kvankam ankaŭ la malo ne malofte okazas laŭ la persa proverbo "La pardonemo apartenas al granduloj" aŭ " Ĉiam granduloj pardonas". Ĉar gaja atmosfero regas ĉie, plejeble paco ekreestos inter ili.


Noŭruza renkontiĝo en Taĝikio

Dum tiu ĉi gaja kaj festa tempo, oni ankaŭ havigas al si belajn flor(vaz)ojn, precipe hiacintojn kaj tulipojn, alportante la printempan aromon kaj ĉeeston en la domojn. Oni kutime metas la florojn sur "sep-so" tablotukon.

Sep-so Tablotuko

Por noŭruzo ĉiu familio aranĝas sian *sofreje haft-sin* (sep-so tablotukon), surmetante sep diversajn aĵojn sur tablotukon, kies nomoj en la persa komenciĝas per litero so. Ili simbole reprezentas la sep kreadojn kaj la sep sanktajn eternulojn protektantaj ilin. Ofte ili konsistas el:

1- *Samanu*, persa manĝetaĵo el faruno kaj sukero
2– *Sib*, pomo
3- *Sabze*, verdaĵo, kion oni kreskigas hejme el tritiko, aŭ similo
4- *Sonbol*, hiacinto
5- *Sir*, ajlo

La irana kalendaro estas pli preciza ol la gregoria kalendaro, kvankam la lasta ekestis jarcentojn pli poste en 1582 p.K. kaj kvankam ambaŭ ili estas sunaj kaj entenas superjarojn. Dum la 11-a jarcento grupo de iranaj sciencistoj, i.a. Omar Kajjam (ĉ. 1050-1122 p.K.), reviziis la iranan kalendaron, kiu jam ekzistis de miljaroj

6- *Senĝed*, alizo
7- *Serke*, vinagro

Se iu ero ne atingeblas, ekzistas aliaj anstataŭaĵoj kiel *somag* (sumako) aŭ *sekke* (monero), kvankam laŭkrede ĉiuj eroj devas aŭ esti plantaj (kiel *sabze* kaj *sonbol*) aŭ havi plantan devenon (kiel *samanu* kaj *serke*). Kutime oni ankaŭ aldonas sur la tablon: (ja de post Islamo) La Noblan Koranon, dolĉaĵojn, spegulon, kandelojn, kolorigitajn ovojn kaj ruĝajn fiŝetojn naĝantaj en akvobovlo. Kiam la jaro ekŝanĝiĝas, se vi rigardantas la ruĝfiŝetojn, bonaŭguron vi ĝuos dum la novjaro. Ekpost la jarŝanĝiĝo ĉiuj familianoj interkisas gratulante unu la alian kaj la pliaĝaj donas donacaĵojn aŭ (novan) monon al

Printemp' kaj am-idolo, kiu huriojn spitas,
kaj ĉe herbeja rando min al vinkruĉ' invitas:
nu, estu mi – ne gravas orelojn malrespekti –
de hundoj malŝatata, se mi Edenon citas! [1]

malpliaĝuloj, precipe al infanoj, kiuj spertas sian plej gajan tempon ĝuante la plej longan feriadon – iam pli ol du semajnojn – kaj ricevante multajn donacaĵojn kaj monon, kaj manĝante tro da dolĉaĵoj!

Ĉiu familio klopodas aranĝi sian sep-so tablon kiom eble, plej bele kaj delikate, ĉar i.a. dum la unuaj 12 tagoj de la printempo, ĝi restos ne tuŝita kaj ĉiuj vizitantoj rigardos ĝin kaj laŭdos la guston de la domanoj por la stilo de aranĝado.

Sizdebedaro, ekskurso en naturon

En la antikva persujo, ĉiu tago de la monato havis propran nomon, kaj apartenis al speciala anĝelo. La dektria tago de farvardino, la unua irana monato, kiu komenciĝas per la unua tago de la printempo en la norda hemisfero (21-a de marto), apartenas al pluv-anĝelo, kiun reprezantas ĉevalo. Sekve dum la 13-a tago de la printempo pluvado estas multe atendata – kaj fakte tio okazas multam. Tial dum la tago, en pliantaŭaj eraoj oni okazigis diversajn ludajn konkursojn ankaŭ kun ĉevaloj.



"Sabze" verdistino

Dum 13-a tago de la printempo – kio plejofte ankaŭ estas la lasta noŭruza feritago por la lernejanoj - ĉiuj eliras el la domoj en la naturon por ĝui refreŝiĝantan medion kaj tuŝe senti la printempon ĉee. Eble tio devenas de kredo pri malbonaŭguro de la numero 13, kaj tiel ili volas fuĝi el renkontiĝo kun malbonaĵoj hejme. Kaj eble tial ĝi nomiĝas *Sizdebedar*, t.e. "dektria-forigado" aŭ "-pasigado". Alia eblo, kiel dirite, estas nur ekreirado en la naturon post la longa kaj malvarma vintro, kio tion ne permesis.

Dum la ekskurso, oni ludas, tagmanĝas kaj ĵetas sian verdaĵon – kio ĝis la 13-a tago estis sur la sep-so tablo - en akvon prefere fluantan, kiel riveron aŭ rivereton. Ies-krede la verdaĵo jam ensorbis ĉiujn eventualajn malbonaĵojn de la ĉirkaŭaĵo de la familio. Alia funkcio de la verdaĵo estas tio, ke ĉiu povas kunnodi ties tigojn por certigi al si la plenumiĝon de sia(j) deziro(j). Plejofte temas pri junaj fraŭlinoj, kiuj deziras esti en la edza domo venontjare brakumante sian infanon, do ili laŭ persa rimaĵo: "Sizdebedare, venontjare, edza-dome, infanbrakumante" nodinte la verdaĵojn, forĵetas ilin en la akvon fluantan. Laŭdire kunnodiĝo de vardaĵoj simbolas la kuniĝon de viro kaj virino.

En la antikva persujo, ĉiu tago de la monato havis propran nomon, kaj apartenis al speciala anĝelo. La dektria tago de farvardino, la unua irana monato, kiu komenciĝas per la unua tago de la printempo en la norda hemisfero (21-a de marto), apartenas al pluv-anĝelo, kiun reprezantas ĉevalo.

Notoj:

(1)La Robaioj, Umar Kajjam, Trad. G. Waringhien, Antverpeno/La Laguna/Chapeco: TK-Stafeto/Fonto, 1984 (2a eld.), 107 p., robaio n-ro 23.

Fontoj:

http://www.geocities.com/persiansociety/nowrooz.html
http://encyclopedia.laborlawtalk.com/Nowrooz
http://www.farsinet.com/norooz/haftsinn1.html
http://www.farsinet.com/norooz/sizdehbedar.html
http://encyclopedia.laborlawtalk.com/Persian_calendar

Feliĉan Noŭruzon 1384!
Sanon kaj pacon deziras al vi
kaj via familio la redakcio de
IRANA ESPERANTISTO

Dediĉita al Negar Ĥazai, kiu ĝuinte bonon, entuziasme disvastigas ĝin.

Irana verkisto: Reza Gasemi

Nova Fremdulo, Irana Fremdulo

La nokta harmonio de la ligna orkestro

Asad Mahbub

La radikoj kaj la kunteksto

Kiam en 1942 Albert Camus, elp. Alber Kamo (1913-1960) verkis sian majstran romanon filozofian La Fremdulo (*L'Étranger*), li probable ne povus antaŭvidi tiel longdaŭran efikon de sia verko kaj ties ĉefrolulo Meursault, elp. Morso, kaj sur filozofion kaj sur beletron ĝis post pasado de pli ol duonjarcento. Atmosfero ekzistencialista, kion li estigis ene de la flua kaj funda romano, tiel restremis en la mensoj kaj transformis Meursault en filozofian/klerulan tipon, kiun diversaj generacioj jam utiligis kiel simbolon de absurdo.

Certe Camus ne komencis de nulo. **Ekde kiam la dana filozofo Søren A. Kierkegaard (1813-1855), la fondinto de moderna ekzistencialismo, reagis kontraŭ la sistema absoluta idealismo de la 19a-jarcenta filozofo germana G.W.F. Hegel (1770-1831), la emfazo sur ambigueco kaj absurdeco de la homa situacio ne perdis sian gravon kaj efikon sur la mensoj kaj pensoj de la filozofoj kaj verkistoj.** Vojo filozofie daŭrigita per grandaj pensuloj kiel F.W. Nietzsche (1844-1900), M. Heidegger (1889-1976), J. P. Sartre (1905-1980) kaj Camus, beletre kondukis al literaturaj gigantoj kiel F. M. Dostoyevski (1821-1881) kaj Camus mem – kiu i.a. gajnis Nobelpremion pri beletro. Ili du, eble apartenas al la plej sukcesaj ekzistencialistaj verkistoj. Tamen, denove, ili ja ne estis la lastaj. Multege da verkistoj internacie daŭrigis ilian vojon. Kune kun novaj filozofoj kaj verkistoj, temiĝis ankaŭ pli novaj ismoj kaj aliroj filozofiaj kaj sekve de ili ekaperis diversartaj i.a. literaturaj stiloj. Postmodernismo certe estas unu el la logike postvenantaj pensmanieroj. La nuntempaj verkoj, kiel tiuj de Umberto Eco, elp. Eko (1932-) kaj Reza Gasemi (1949-) ja devenas de la longdaŭra proceso, kies unu el la ĉefmejlŝtonoj estas La Fremdulo de Camus. **Eble oni povas nomi verkistojn kiel Gasemi La Nova Fremdulo, kaj socie kaj filozofie. Gasemi, kvazaŭ Irana Fremdulo, socipolitike ektrovis sin en la mezo de fremd-kontinento Eŭropo, kaj filozofipense ekvidis sin la ido de Camus-a Fremdulo ankoraŭ forlasita sur la tero.** La fremdeca etoso reganta lian romanmondon interpreteblas kaj filozofie kaj socipolitike.


Ekzemple estis Camus, kiu diris: "Homoj ne estas absurdaj, kaj la mondo ne estas absurda, sed por homoj esti en la mondo estas absurdo." Tute evidente oni povas retrovi la sencon en la nova vesto de postmodernismo tra la verkoj de verkistoj kiel Gasemi.


La Aŭtoro, diversbranĉa artisto

Reza Gasemi (1949-), naskiĝinta en Esfahano, antaŭ kiam fariĝis renoma roman-verkisto, estis muzikisto, teatraĵ-verkisto kaj -reĝisoro. Unue en 1968 li konigis sin per teatraĵo nomata *Kosuf* (La Suneklipso), kiu aperis en la revuo Ĥuŝe (t.e. La Grapolo). Poste, li i.a. kunlaboris kun la plej famaj kantistoj de Irano, kiel M.R. Ŝaĝarijan kaj Ŝ. Nazeri pri la tradicia muziko de persujo. Li verkis 10 teatraĵojn kaj reĝisoris 8. **Liaj teatraĵoj aperis en Irano, Francio kaj Svedio. Lia poemaro *Loknat* (Balbuto) aperis en Parizo. I.a. "La enigmo de arkitekto Mahjar", unu el liaj teatraĵoj, sursceniĝis en Francio, kaj "Estas via vico, Merkuŝijo!" radioteatre elsendiĝis per franca radiostacio Franca Kulturo.**

Liaj verkoj tradukitaj francen inkluzivas la jenajn: "La nokta harmonio de la ligna orkestro", "Estas via vico, Merkuŝijo!", "La enigmo de arkitekto Mahjar" kaj "La bildo".

Patro, La Patro
Kiel Gasemi rakontis dum verketo en 1997 (n-ro 65 de persa beletra revuo *Araŝ*), lia patro, kiu siavice kaj siatempe ege deziris fariĝi verkisto, kaŭzis lian faktan verkistiĝon. Dum la unuaj jaroj de sia dekkelkjaraĝo, por la lernejo Reza devis skribi sian unuan eseon, kies temo estis "la bovo". Li nenion povis surpaperigi, ĉar nek vidintis bovon, nek estis skribinta kion ajn krom tekstkopiaĵoj – la ĉafa hejmtasko de iranaj lernejoj eĉ en nuntempo. Lia patro skribis la eseon anstataŭ li, kaj kiam Reza laŭtlegis ĝin en la klaso, la instruisto multe laŭdis lin kaj donacis al li bonan brakhorloĝon kiel premion. Ekde tiam li amegis pri la instruisto kaj verkado. Tamen multajn jarojn poste, kiam li estis 17-jara, kaj jam publikigis siajn verkojn en la revuoj, li ekkomprenis ke la premion lia patro estis doninta al la instruisto por donaci al li. Tiel ŝokita, ekde tiu momento li forlasis verkadon por kelkaj jaroj. Gasemi neniam komprenis ĉu la instruisto ankaŭ sciis pri tio, ke la patro mem estis skribinta la bov-skribaĵon, tamen li realvenis al verkado kaj fariĝis fama verkisto laŭ la volo, "komploto" kaj klopodoj de la patro.





Plejeble La nokta harmonio de la ligna orkestro estas la ĉefverko de Gasemi. Ĝi unue aperis perse en Usono (1996) kaj poste eldoniĝis france per Phébus eldonejo (2001), kaj pliposte perse en Irano (2002).

La Verko, Romano en Romano
Krom la filozofia pensmaniero reganta la ĉefverkon de Gasemi **La nokta harmonio de la ligna orkestro**, oni povas ankaŭ konsideri ĝian beletran valoron kaj stilon. Certe la stilo konformas al la postmoderna literaturo: ekz-e la hipertekstaj aludoj kaj citoj ne malmulte enestas la romanon. Ankaŭ la klasika aŭ tradicia beletro de Irano kaj la persa lingvo ne malabunde videblas verkoene. Ekz-e, la komenca paĝo de la romano, krom citado de verso de Ŝahnameo de Ferdoŭsio (940?-1020?):
"*Kiam tempo de la viro malheliĝas*
Tiam faras ĉion, kion ne utilas",
ekiĝas jenel parenteze aludante al historio rakontita en la Masnavio de Rumio (1207-1273) pri nenatura seksa sensoifigo de sklavino:
"Mi estis kiel ĉevalo, kiu ĵus antaŭsentis ekokazon de katastrofo. Ĉu vi jam vidis kiel ĝiaj okulbulboj eksplodemas pro trograndiĝo, kaj kiel ĝi transformas la timegon pleniginta ĝian kranion en ventoblovon en siajn naztruojn? Ĉu vi jam vidis kiel ĝi henas tiam kaj bategas siajn hufojn kontraŭ la tero?
Nu, nek mi vidis tion. Tamen, se mi estus ĉevalo, tiel mi malkaŝus mian teruriĝon. (Kiu scias? Ekzistas multege da sklavinoj kaj multege da kukurboj! Eble iun tagon, patrino el miaj patrinoj, metis stablon sub la ventron de bruto por ke en tiu senhoma angulo humida de pajlargila stalo kaj en tia mallumeto miksita kun odoroj de herboj kaj fekaĵoj, enprenu mian spermon kaj envolvu ĝin en maldikan kovraĵon da envio kaj dezirego.)"
Aliaspekte la verketoso rememorigas onin pri la magia realismo kaj surrealismo. Kio plu allogigas la verkon, estas ĝia sinteno al ĝi mem: kiel la leganto kelkloke ekkomprenas, temas pri "Romano en romano". "Reza Gasemi" aŭ "La nokta harmonio de la ligna orkestro" ekaperas dum la historio rakontita en ĝi. Por tre koncize konatiĝi kun la temo de la verko kaj ĝiaj mondo kaj stilo, jene venas partoj de recenzo aperinta en Le Monde:

Partoj de recenzo el *Le Monde* pri **La nokta harmonio de la ligna orkestro**:

Sub la parizaj tegmentoj

Miksaĵo el socia realismo kaj fantazio, konsterna rakonto pri ekzilo

La muziko, al kiu aludas "la nokta harmonio" nenian rilaton havas al serenado aŭ sonato sub la lunlumo. Sed temas pri komponaĵo verkita por ligna orkrstro; nome segilo, martelo, elektra borilo, elektra varmigilo kaj ankaŭ sonoj kiel tiuj de lito, spirado (de ĉia speco) kaj neceseja sifono. Ĉio ĉi estigas scenej-muzikon por la sesa etaĝo de pariza konstruaĵo en la kvartalo Sankta Paŭlo, kies subtegmentoj estas loĝejo de iranaj rifuĝintoj.

Inter tiaj ĉi bruoj, oni malfacile povas aŭdi kelkajn akordojn: la bruadon de gastoj de Miloŝo, ĉeĥa muzikisto; aŭ operon Karmen, kiun disaŭdigas unu el triaetaĝaninoj, kiam volas amori kun la amiko. La rezulto de tia rakontado pri la ciganeska vivado sub la 1990aj parizaj subtegmentoj, povus esti nur alloga verko, kaj nenio plu; kompreneble se la verka kompozicio ne estus tiom delikata.

La rakontanto de la historio, kiu estas kolorigisto kaj en sia libertempo desegnas portretojn, okupas mirindan lokon en la rakonto. **Li, kiu suferas postsekvaĵojn de emociaj eventoj kaj jam difektiĝis pro la perdado de sia identeco (kio estas natura postsekvo de ekzilo), suferas ankaŭ de aliaj malsanoj, kiuj dubigas eĉ la verecon kaj neŭtralecon de la rakonto de li mem**: antaŭ ĉio, li suferas "sindetruadon". Poste estas lia malsano pri "temp-prokrastoj", kio malhelpas lin kronologie. Kaj fine "spegulmalsano", kio ne lasas lin vidi sian reflekton en la spegulo. Nek lia ĉirkaŭanta mondo estas malpli stranga. En tia mondo, ĉiu elpensas ion por plibonigi sian vivon. Unu sekvas mistikan amon; alia, kiu pensas pli tere, jam akceptis senpage duobligi la utiligeblan surfacon de la ĉambroj por la loĝantoj per konstruado de ligna mezetaĝo (kaj tio grave kontribuas al la ligna orkestro); tondreca profeto, kiu insistas por plenumado de la diaj ordonoj, supozas ke la satanaj komplotoj jam sieĝis lin…

Tia kunmikso de socia realismo kaj fantazio, tia miriga kaj bolanta rakontarto, faras timigan fremdecon el tiu ĉi verko, kio estas kontemplado pri ekzilo: neatendita pariĝo de rakontoj de (Ernst T.A.) Hoffmann (1776-1822) kun la fabeloj de **Mil unu noktoj**.

Gerard Meudal, Le Monde, 24 Aŭgusto 2001.

Kiel vidite – kaj kiel atendeble – Le Monde ne pritraktas aŭ interpretas la filozofiajn ecojn de la verko kaj verkisto, kaj nur temigas sociajn kaj politikajn aspektojn de ili. Tamen pri tio ni legos malsupre el la buŝo de Gasemi mem dum interesa intervjuo.

Irana feminismo laŭ Gasemi

Kvankam la tuteca atmosfero de la romano estas surrealisma kaj iel laŭ la magia realismo – eble plej klasike videbla en la fama verko de Gabriel García Márquez (1928-), **Cent jaroj da soleco** – tamen de tempo al tempo ekaperas pensige kleraj fragmentoj serĉante radikojn kaj kialojn por la sociaj ŝanĝoj. Kiel ekzemplo, la rakontanto, kiu envolviĝis kun virino nomata Rana, iam eldiras siajn eltrovitojn pri iranaj virinoj kaj feminismo:

*Fragmento el **La nokta harmonio de la ligna orkestro***

"**La proceso de la inventado de la irana moderna virino, ne malsimilas al tiu de la aŭtomobilo. La nura diferenco estas tio, ke la aŭto estis kaleŝo, kies enhavo unue ŝanĝiĝis (nome, oni forprenis ĝiajn ĉevalojn kaj anstataŭigis ilin per la motoro) kaj poste ĝia ekstera formo iom post iom konformiĝis al la nova enhavo; kaj ĉe la irana moderna virino unue ŝia formo ŝanĝiĝis, kaj poste, kiam oni serĉis por konvena enhavo, la afero ekmalfaciliĝis. (Nek la inventado de la tradicia virino, kio okazis pli poste laŭ la sama proceso, estis malpli malfacila afero).** Tial ĉiu, laŭ siaj eblecoj kaj persona gusto, el menseco de la tradicia virino kaj la postulaĵoj de la moderna virino faris kunmetaĵon, kies vari-spektro, iam, estis de ĉadoro ĝis minijupo. Ŝi volis partopreni en ĉiuj decidadoj sed postulis ĉiujn respondecojn de sia viro. Ŝi deziris ke ŝia personeco brilu ĉe la aliaj ne ŝia sekseco tamen ŝi antaŭenvenis kun siaj seksaj allogaĵoj. Ŝi surmetis minijupon por elmontri la piedojn sed se iu diris ion al ŝi, ŝi ekplendis kontraŭ onies okulumado. Ŝi postulis egalan partoprenon de la viro en la hejmaj laboroj, sed samtempe taksis malforta kaj senpersoneca viron, kiu jam akceptis tian partoprenadon. Ŝi deziris esprimi sian opinion pri la seriozaj temoj, sed ŝi ne klopodis por havigi al si seriozan vidpunkton. Pri sia geedzeca kunvivado ŝi malkontentis, sed havis kuraĝon nek por disiĝi, nek por perfidi. Ŝi kredis al seksa egaleco kaj reciproka kontentigado, sed, kiam proksimiĝis al divorco, ŝi ek-vebedaŭris pri sia juneco, kion ŝi senrezulte vanigis por la alia.

Sendube ekzistis virinoj, kiuj staris ĉe unu el tiuj du ekstremoj. Tamen Rana situis ĝuste en la mezo de la spektro…".

GASEMI, Reza. La nokta harmonio de la ligna orkestro, Tehrano: Naŝre Atije, 2002, 192 p., p. 86.

Irananecoj laŭ Gasemi

La romano nek malhavas historieskajn priserĉadojn rilate al la iranaj karakteroj kaj sintenoj. Ie, la rakontanto trovinte sin paralizita antaŭ la situacio, kiun li mem lasis okazi nur por "ne ĝeni la alia (j)n", serĉemas la sindetruan kialon ĉe sia nacia ecaro historia:

"**Sento de martiriĝemo kaj kruelateco, kio estas tute irana karakterizaĵo, dum la historio neniam lasis nin ĝustatempe enordigi la problemojn, kiuj solviĝas per nura vango-frapeto; ni faras nenion ĝis kiam eĉ per mortigado nenio solveblas; tiam nia sango ekbolas kaj ni forbruligas ĉion kaj solvas nenion**, kaj mi, kiu en tiu ĉi momento, estis tute unuiĝinta kun nia historio, kiel kruelata martiro, ekprenis la tagĵurnalon kaj post rigardeto al la kineja kolumno diris: 'Estas ĉirkaŭ la deka horo. Ekzistas kinejo ĉi-proksime, se ni ekhastu, ni atingos al ties fina seanco.'"

GASEMI, Reza. La nokta harmonio de la ligna orkestro, Tehrano: Naŝre Atije, 2002, 192 p., p. 90.

Diriva Intervjuo


Dum telefona intervjuo inter Tehrano kaj Parizo, Sepide Zarrin-Panah demandis Reza Gasemi pri diversaspektaj punktoj rilate al li mem kaj lia ĉefromano **La nokta harmonio de la ligna orkestro**. Ĉar la materialo bone montras pri personeco kaj filozofio de la verko kaj verkisto, kaj funde bildigas la ekzistiĝkialon de tia verko, ĉi tie ni kunlegas partojn de ĝi en nia lingvo, tradukita el la persa originalo. La intervjuo komenciĝas tiel:

Sepide Zarrin-Panah: "La ĉeftemo de via romano **La nokta harmonio de la ligna orkestro** estas detruiĝo. La detruiĝo estas teksita kun la strukturo kaj personecigoj. La mondo de la romano estas kiel disrompita spegulo, kies erojn kiom ajn ni klopodas ĉemeti, ankoraŭ ili misĉemetiĝas pro la ega disdetruiĝo. Nome ĝi malhavas formon, laŭ kiu ni povus juĝi pri la pesonecoj kiel duoble du estas kvar. De kie devenas tia amara kaj pesimista alrigardo?"


Reza Gasemi: "Tia amara alrigardo devenas de mia personeco kaj la aliro aŭ sinteno, kion mi havas al la ekzistado; alrigardo, kio neniel estas optimista. Se vi rigardu nur al ĉi-lastaj 1400 jaroj de nia historio, vi vidas ke dum sinsekvaj atakoj de diversaj gentoj, post ĉiu milito parto de ni eldisiĝis. Foje nia lingvo ŝanĝiĝis; foje nia religio, kaj alifoje nia fido. Nur dum la lastaj du centjaroj, nia geografio dufoje ŝanĝiĝis (sekve de la militoj de Rusio kontraŭ Irano). Ankaŭ de post nia konatiĝo kun la okcidento, ĉio nia, de la ĉielo ĝis la tero, tute malordiĝis kaj ni mense disduiĝis. Dum la lasta jarcentkvarono, ni spertis revolucion, okjaran militon, kaj kvarmilionkapan elmigradon; nome eventoj, kiujn alia socio aŭ nacio spertas eble dum unu centjaro.

Krom ĉio ĉi, ne nur nia historio multfoje ŝanĝiĝis, sed ankaŭ **kun alveno kaj foriro de ĉiu registaro plurfoje ŝanĝiĝis nomoj de niaj urboj, stratoj kaj eĉ aleoj. Ĉu tio ne signifas ankaŭ diseriĝon de nia personeco kaj identeco?** Tio, kio postrestis de nia kulturo, estas disaj bilderoj, kiuj neniel ĉemeteblas; kvazaŭ ĝi estas puzlo, kies eroj ne facile konformiĝas kaj alligiĝas. Perditaj pecoj kaj angulaĵoj tre multas. Ĝi ne povas trovi integran formon. Nu, kun ĉio ĉi, kiel **La**





Kiel Gasemi rimarkigas, filozofio agas trans geografio, socia stato, ekonomio kaj politiko: nek en la plievoluinta okcidento malmultis pesimistaj pensuloj: Franz Kafka, Samuel Beckett kaj Thomas Berndard.



Reza Gasemi, kies verkoj lastatempe ekhavis permeson eldoniĝi en lia lando, Irano, povis gajni plurajn premiojn dum mallonga tempo de tre diversaj fontoj.

nokta harmonio de la ligna orkestro povus ne esti amara? Precipe se ni konsideru, ke la romano eldiriĝas laŭ vidpunkto de rakontanto kun tiel speciala spiritstato, kaj kun tia amara pasinteco."

Sepide Zarrin-Panah: "Ĉu ankaŭ dum kiam vi estis en Irano, viaj verkoj estis amaraj?"

Reza Gasemi: "Jes. Ankaŭ en Irano miaj verkoj havis saman koloron kaj guston; sed iom post iom mi lernis kaŝi la nigrecojn sub tavolon de satiro.

Sepide Zarrin-Panah: "Tia nigreco ĉu devenas de idealisma fiasko aŭ de ia filozofia pesimismo?"

Reza Gasemi: "Pli multe, de ia filozofia pesimismo. Mi ne scias kio estas ties radikoj. Eble ekzistas homspecoj, kiuj havas alvokon de la morto. Eble ankaŭ la sorto, kiun mi travivis, ne estis senefika al tia ĉi pesimismo. Ĝis kiam mi memoras, mi partoprenis en funebradoj. Nuran fojon, kiam mi partoprenis en geedziĝfeston, mi ploris. La kialon mi ekkomprenis poste: tio estis enkonduko por partopreni en serion de aliaj funebradoj, i.a. de la sama novedzo. Aliflanke, kvazaŭ nia individua sorto iel kunnodiĝis kun nia socia sorto. Antaŭ kelkaj tagoj, kiam forpasis Reza Ĵijan, mi sidiĝis antaŭ la komputilon por skribi ion liamemore, tiam mi subite konstatis ke preskaŭ ĉiuj, kiujn mi konis kaj estis miaj samgeneracianoj, jam forpasis."

Sepide Zarrin-Panah: "Do temas pri Tria-Monda, aŭ plibonvorte orienta pesimismo?"

Reza Gasemi: "Ne, tio estas nur unu flanko de la afero. La alia flanko, samkiel mi jam diris, estas la filozofia, kio neniel rilatiĝas al la sociaj kondiĉoj de certa lando. Tio rilatiĝas al la ĝenerala kondiĉaro de la mondo. **Eĉ se en umbiliko (centro) de bonstata kaj senangora socio mi estus grandiĝinta, probable ankoraŭ mi havus la saman filozofian pesimismon. Ĉu la nombro de tiaj homoj en la okcidento estas malmulta? Homoj kiel (Samuel) Beckett (1906-1989), (Franz) Kafka (1883-1924), Thomas Bernhard (1931-1989)** ... Tio estas ia homspeco. Ne gravas kie estas ties radikoj. Grava estas tio, ke tia homspeco ĉiam ekzistis kaj plu ekzistos por ĉiam. Ĉar io ne estas sur sia loko en ĉi mondo (kaj tion kiom bone elmontris Ĉeĥof en siaj verkoj). Kiel sciate, plej multaj homoj nostalgie sopiras malnovajn tempojn; ili supozas ke la malnova mondo estis pli bona. Sed sufiĉas serĉi tra la malnovaj tekstoj por ekvidi la spurojn de tia sopirado en ĉiuj eraoj. Feliĉe mi ne estas nostalgia homo. Nome mi vakcinis min kontraŭ nostalgio. Verdire, mi ne kredas ke la mondo pli boniĝas, aŭ pli malboniĝas. La mondo nur ŝanĝiĝas, nur tio. Kaj tio estas la plej malesperiga el ĉio."

Gasemi kaj Memcenzuro

Dum la supre menciita telefona intervjuo inter Tehrano kaj Parizo, Sepide Zarrin-Panah i.a. demandis de Gasemi: "Ĉu vin ne kaptis memcenzurado?" kaj la respondo jenis: "Mi pensas ke sen kompleta elmontrado de karaktero de la personecoj, neniu ostohava romano povas estiĝi.... **Ĉiuj ni havas malicon, malgrandecon, friponadon, kaj kiun ajn alian hommalforton, kion oni povas imagi. Eble pli aŭ malpli, sed neniam sen.... Jam pasas dek sep jaroj ke mi ĝismorte klopodas liberigi min de ĉia ligilo kaj limigilo. Sed mi certe diras ke ankoraŭ mi devas pasigi longan vojon por esti kiel persono, kiu grandiĝis en libera medio.** Kaj certe tio eblas ke oni ne povu liberigi sin el efektoj de la infanaĝa periodo." ★

Fontoj:

GASEMI, Reza. *Hamnavaije ŝabaneje orkestre ĉubha* (La nokta harmonio de la ligna orkestro), Tehrano: Naŝre Atije, 2002, 192 p.
Microsoft Encarta 2005, far pli ol 1000 kontribuantoj kaj 300 konsultantoj, versio: 14.0.0.0603, Usono: Microsoft, 2004, 4 CDs.
www.spikemagazine.com/0299bernhard.php.htm
www.rezaghassemi.org/critique13+2.htm
www.rezaghassemi.org critique1.htm
www.rezaghassemi.org/maghaleh1.htm
www.bbc.co.uk/persian/arts/021219_l-g-ghasemi.shtml.htm

La Mistika Ebrieco

R. Platteau

Ni tre gajas ke la artikolserio pri la iranaj mistikuloj jam vekis intereson ankaŭ inter la neiranaj legantoj de Irana Esperantisto. Dankante al franca samideano R. Platteau, kiu verkis jenan artikolon pri la kristana mistikismo por nia revuo, ni esperas je pluaj da dialogoj inter la civilizacioj en nia lingvo – la lingvo por internaciaj dialogoj kaj "oligologoj" kulturaj.

La Red.

Enkonduko

Mi okazis ĉeesti prelegon pri la kristana mistiko tra la verkoj de Sanktulino Terzeo el Avila kaj Bossuet. Tiam mi pensis, ke prezento de la kristana mistika tradicio povus interesi viajn legantojn kaj iamaniere kompletigi la artikolojn jam aperintajn pri famaj iranaj mistikuloj. Se mi enmetas kiameble interretajn ligojn al la Esperantlingva Enciklopedio «Vikipedio», ne estas por propagandi ĝin (hmm eble iomete tamen!) sed por kutimigi esperantistojn al serĉado kiambezonate en tiu interreta esperantligva libere konstruata sciofonto. (kaj ni atendas je pli da irananoj inter la kontribuantoj! hmm ankaŭ iom da varbado!)

Sanktulo Aŭgusteno kaj Boeeuet

La unua ĉefa teoriisto de kristana mistiko estis Sanktulo Aŭgusteno (354-430 p.K., en la Vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Auxgusteno), kiu mem estis iom influita de la platonisma penso. Li diris «Mia amo konsistigas mian pezon», liaokule homo estas deziranta estaĵo. Ĉiuj strebas, eĉ se diversmaniere, al feliĉo. Kaj la ideo retroviĝas senŝanĝe ĉe Bossuet (1627-1704 p.K.), ĉar: "Ne eblas voli ion ajn nevolante ĝin por esti feliĉa". Do male al ofta karikatura ideo, kiun nekredantoj faras pri mistiko, ĝi baziĝas sur la ideo de deziro kiel fundamento de la homa naturo. Kaj la serĉado al la plej granda plezuro ebla kondukas al la deziro je Dio, kaj je ĝuado, kiu neniam finiĝas (male tiujn de la tero). Sciante aŭ nesciante la homoj estas «*theotropa»,* diendirektitaj, ili serĉas Dion ĉie.Tio estas ia formo de la ĝuado, kiu estiĝas el vivi en la idealo.

Tiel paradokse la asketismo, foje ege severa, de tiu epoko celas fakte la plej grandan plezuron. Sed tiu plezuro ne estas la ordinaraj egoismaj forpasemaj plezuroj de la tero, tial mistikuloj foroferas tiujn en la strebado.



Foto: http://r.platteau.free.fr

Terezo el Avilo

Kaj kiam oni legas la tekstojn ĉu de la mistikuloj mem, kiel Terezo el Avilo (1515-1582 p.K., en la Vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Terezo_el_Avila), ĉu de teologoj tiutempaj, ade revenas esprimoj kiel «ĝuegado», «mieldolĉega», «ebrieco», «raveco», «forperdiĝo». Ĉiuj emociaj fontoj de la homa animo estas mobilizitaj. Kaj tradicie jam en la Biblio (en la Vikipedio:http://eo.wikipedia.org/wiki/Biblio) en la *Kanto de kantoj*, dialogo inter geamantoj, bildo de la homa tenereco estas bildigo kaj simbolo de amo inter animo kaj ties Dio. Jen lingvaĵo nepre ne asepsa, nek malemocia.

Kaj tiu «venko» de Dio estas senperforta venko, ĉar elektas la laŭplaĉa elektopovo homa, libere elektas la homo esti pli feliĉa.

Nun for de la intimaj sentoj spertitaj dum preĝado la homo sentas kiel ekzilito sur tero. Kaj kiam li revenas al la sobra ĉiutaga vivo, al li ŝajnas, ke li sekvas malnormalan, sensencan vivon. Ie Aŭgusteno plendas «kiom malfrue

Ferdoŭsio, la majstro de l' persa poezio

Mi deziras versi pri homo,
ĉie en persujo brilas kies nomo,
Kiu uzis el la viv' tridekjaron
verkante la plej valoran versaron.

Kiu per kreo de herooj fortaj,
kvankam ili ŝajnis nur vortaj,
kaŭzis revenon de l' memfido
forfluginta de ĉiu irana ido.

Kiu per rakonto de nia prahistorio,
miksante tion kun iom da fantazio,
kaŭzis vivadon de l' persa civilizacio
apud l' akceptita islama religio.

Kiu la persan lingvon savis
el suba rango kion ĝi havis.
Kiu per Rostam kaj Sohrab
distingis la person de l' arab'.

Mi diras pri Abol-gasem Ferdoŭsi,
la majstro de l' persa poezi',
Homero de Irano, honoro de Irano,
lia verkego, hejme de ĉiu iranano.

Kejhan Sajjadpur



mi komencis ami Vin, ho beleco tiom malnova!»

Sed tiuj fulmaĵoj da perfekta ĝojo, kie oni sentas renkonti Dion senvuale, ne daŭras, kaj ofte okazas periodoj kie ne plu eblas preĝi, kiam Dio sin kaŝas en malluma «nokto de la animo», temo fame kantita de Sanktulo Johano de la Kruco (en la Vikipedio : http://eo.wikipedia.org/wiki/Johano_de_la_Kruco), estiĝas naŭzo pri Dio, eĉ duboj.

Dio fortiris siajn «senteblajn allogaĵojn» t.e. la unuajn emociojn travivitajn dum la mistika malkovro, kaj oni sentas, kvazaŭ oni restas sendia sur tero. Sed tio estas elprovo, por pli bone supreniĝi pli poste, pli pura.

Kaj fine «la larmoj revenas» (en tiu tempo oni estis konscia pri la profundeco de la valoro de larmoj. kp. kun Cioran: «La pensoj pri kiuj ni bedaŭras, ne ŝuti larmojn, estas la plej profundaj, kaj estas al ni la plej karaj»), en la Vikipedio: ttp://eo.wikipedia.org/wiki/Emile_CIORAN

Oni komparas la animon ravitan de Dia amo je alaŭdo, kiu kantas ebrie altiĝante al la ĉielo, ĝis perdi sian spiron, kaj tiam refali teren. Finfine venas aferoj pri kiuj - kaj eĉ Bossuet la rezonanta respondeculo diras tion - oni ne plu povas sin teni en la parolo, kiu iĝas sentaŭga, «ĉio finiĝe perdiĝas en ion nekonatan». La dogmo malkroĉiĝas fine en la nenomeblaĵo, kiun ĝi esprimas.

Komplemente mi aldonos mencion pri polemiko, kiu plenigis grandan parton de la vivo de Bossuet kaj alia episkopo (en la Vikipedio:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Episkopo): Fénelon (en la Vikipedio:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Fénelon) Iu mistikulino tiutempa (la 17-a jarcento post Kristo, en Francio, tio estis la tempo de reĝo Ludoviko la 14-a) S-ino Guyon, petis ke oni estingu ĉian ideon pri feliĉo, kaj iĝis ĝis diri ke la perfekta preĝadostato estas, kiam la animo estas tute kvieta (el tio la nomo: «Kvietismo»), en stato de plena pasiveco, tiomgrade sindonita al Dio, ke ĝi eĉ zorgas pri nenio, eĉ ne pri tio, ke fari la bonon aŭ ne, ne timanta pri io ajn, eĉ ĉu ĝi estos savita aŭ ne, t.e. ĉu ĝi iĝos Infera aŭ Paradiza. Fénelon fervoriĝis pri tiuj ideoj kaj ankaŭ aperigis librojn pri tio. Post longa polemiko, en kiu Bossuet prenis grandan parton, kaj post iom da hezitado, ĉar tiuj paroloj povus aŭdiĝi ĉe «ortodoksaj» aŭtoroj, sed kiel nurpoeziaj furiozaĵoj. ★

Internacia Esperanto-Renkontiĝo en
Armenio

Antaŭ jaro leviĝis intereso ĉe ni iranaj esperantistoj viziti najbaran landon Armenion. Ni kontaktis niajn najbarojn pri la intereso kaj hazarde eksciis ke ili okazigos renkontiĝon dum aŭgusto. La tempo ne estis konvena al ni ĉar interesiĝantoj ne povus sin akordigi. Ni petis de armenoj se eblus iom malfrue okazigi la renkontiĝon. La respondo estis pozitiva kaj ili afable pro nia partopreno ŝanĝis la daton kaj 18-a de junio estis fiksita kiel la komenco de la renkontiĝo.

Al ĉiuj 11 personoj de nia grupo estis unua fojo viziti Armenion kaj dum 7 tagoj de nia restado inter armenaj geesperantistoj ni spertis tre sinceran amikecan etoson kiun vere ni ne povus imagi!

Aremnaj gesamideanoj faris ĉion eblon por ke ni spertu bonan kaj plaĉan tempon en ilia lando kaj mi aprobas ke ili brile estis sukcesaj!

Ni iranianoj estas famekonataj pro gastameco sed mi jam emas ŝanĝi tiun opinion al armenoj kiuj sincere kaj afable akceptis nin kaj dividis siajn afablojn kun ni simple!

Al aliaj gesamideanoj nur unu frazon mi povas diri: Bonvolu viziti Armenion!

En la 8-a numero kaj en la persa parto ni jam aperigis raporton de s-ro Zereŝkian pri la renkontiĝo, jen raporto kiun plumis la organizantoj mem.

La red.

La 18-24-an de junio 2004 en Armenio okazis Internacia Esperanto-Renkontiĝo, dediĉita al la 100-jara jubileo de la eminenta reprezentanto de Armenia E-movado, Akademiano de la Akademio de Sciencoj de Armenio, Akademiano de la Akademio de Esperanto Gurgen Sevak. La Renkontiĝon partoprenis geesperantistoj el Irano (11 partoprenantoj), Kartvelio(3), Pollando(1) kaj Armenio (pli ol 50) Enkadre de la Renkontiĝo okazis la konferenco «Gurgen Sevak kaj E-movado en Armenio», prelegoj, diskutoj, paroliga kurso, koncertoj, instruado de kantoj, Esperantaj ludoj, amuzvesperoj.

La Renkontiĝo estis projektita tiel, ke la seriozaj kaj amuzaj aranĝoj estu kombinitaj. La partoprenantoj povis ekskursi, viziti vidindajn lokojn kaj serioze labori, ĝuante belecon de la armena naturo. Ĉiutage, post matenmanĝo en la hotelo, la partoprenantoj per du busetoj veturis eksterurben (Oŝakan, lago Sevan, Garni, Geghard, Arzni, Eĉmiatsin, Bĵni), kie ili havis ekskursojn gviditajn de armenaj esperantistoj, kaj poste, en la sino de la naturo, estis efektivigitaj la aliaj punktoj de la programo por tiu tago.

Dum la Renkontiĝo estis prezentitaj prelegoj: Vivo kaj agado de Akademiano Gurgen Sevak (Jerĝanik Gevorgjan); Armenia Esperanto-movado (Lida Elbakjan); La agado de AEA (Karine Arakeljan); Esperanto-movado en Kartvelio (Nana Ĥizambareli;(Esperanto-



Jerĝanik Gevorgjan

Elstara armena e-isto kies prelego kaj teatraĵo estis tre alloga al la partoprenantoj

movado en Irano (Reza Torabi); Esperanto-movado en Pollando (Maciej Wnuk). Okazis diskutoj: Plivigligo de la kunlaboro inter la Esperanto-Asocioj en la regiono; Interŝanĝo de esperantistaj grupoj; Kunlaboro sur la kampo de instruado, turismo, komerco. Araksja (Inna) Elbakjan gvidis E-kursojn por komencantoj ,organizis lingvajn ludojn kaj instruis Esperantajn kantojn.



Unua tago de la renkontiĝo en amikeca etoso

Estis organizita ekskursa veturado tra la urbo Erevan kun vizito al la Instituto de Antikvaj Manuskriptoj Matenadaran, taga kaj vespera promenado en la ĉefurbo, vizito al la suvenira bazaro.

La partoprenantoj ankaŭ ĝuis Esperanto-programon en la Infanĝardeno, kies direktorino (Knarik Davtjan) kaj edukistino estas esperantistinoj- membroj de AEA.

La lastan vesperon la partoprenantoj de la Renkontiĝo estis akceptitaj en la Centra E-klubo en la Domo de Amikeco. Dum la vespero la Irana pentristo-esperantisto s-ro Morteza Habibpur prezentis pere de lumbildoj unikajn specimenojn de sia arto. Armenaj esperantistoj prezentis teatraĵeton - la faman fabelon verkitan de Hovhannes Tumanjan «La morto de Kikos», donacinte al la spektantoj kelkajn minutojn da rido kaj gaja humoro.

Venis la plej kortuŝaj momentoj de la Renkontiĝo- la solena fermo kaj interŝanĝo de suveniroj. Kaj kiel la lasta akordo de tiu bela simfonio de amikeco kaj interkompreno, ĉiuj ĉeestantoj estis invititaj flanke de la iranaj gesamideanoj al la liberaera kafejo, kie ili gustumis famajn iranajn dolĉaĵojn kaj frandaĵojn.

Kvankan la sekvanta adiaŭa mateno emociigis kaj malgajigis ĉiujn, tamen en la koroj restis certeco pri tio, ke komenciĝas nova erao en la historio de la regiona Esperanto-movado, kaj ke la semoj plantitaj dum IER en Armenio nepre alportos bonajn fruktojn!

La laboro de la Internacia Renkontiĝo jam estis prezentita en la speciala televida programo (la 1-an de julio), aperis ankaŭ artikolo en la armenlingva revuo «La nacia mirindaĵo». Armenia E-Asocio dankas ĉiujn organizantojn kaj partoprenantojn de la Renkontiĝo pro la perfekta, senlaca laboro.

Specialan dankon ni volas esprimi: al la grupoj el Irano, Kartvelio kaj Pollando kaj iliajn gvidantojn s-ron Reza Torabi, s-inon Nana Ĥizambareli kaj s-ron Maciej Wnuk pro la aktiva partopreno kaj valora kontribuo al la grava afero de evoluigo de la regiona E-movado; al s-ro David Amirjan, la nepo de Gurgen Sevak, pro la materiala kaj spirita subteno dum la organizado de la Renkontiĝo; al la membroj de la turisma sekcio sub gvidado de s-ro Levon Hakobjan pro la brila organizado de eksterurbaj sesioj de la Renkontiĝo ĉe la adresoj:



ĉe bordo de la lago Sevan okazis neforgesebla internacia koncerto, kaj longe sonis en la kristale pura aero de la perlo de Armena montolando armenaj, kartvelaj, persaj, polaj, rusaj kaj alipopolaj kantoj en naciaj lingvoj kaj en Esperanto.

http://www.iera1.sabzandishan.org
http://www.iera2.sabzandishan.org
http://www.iera3.sabzandishan.org
oni povas vidi fotojn pri la renkontiĝo. ★

Lida Elbakjan,
Prezidantino de Armenia E-Asocio
Karine Arakeljan,
Vicprezidantino de Armenia E-Asocio

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Jes, ankaŭ dum vintro burĝonas floroj. Tamen temas ne pri naturaj floroj, sed pri rakontaj el la fama libro de Sadio, la Florejo, kiuj kiel kutime aperas sur tiu ĉi paĝo de la revuo. Ĝuu ilin.

Rakonto 1

Estas rakontite pri militisto malica kiu ĵetis ŝtonon sur la kapon de pia dervîŝo. La dervîŝo pensis ke la okazo ne taŭgas por venĝo, do li tenis la ŝtonon ĉe si ĝis kiam la reĝo furiozis kontraŭ la militisto kaj kaptigis lin en puton. La dervîŝo irinte ĉe l' puton ĵetis la ŝtonon sur la kapon de l' militisto. Li demandis: "Kiu vi estas kaj kial vi faris tiel?" Li respondis: "Mi estas tiu persono kaj la ŝtono estas la sama kion vi ĵetis sur mian kapon en tiu dato." Li demandis: "Dume kie vi estis?" Li respondis: "Mi timis de via persekuto, sed nun la okazon mi trovis opurtuna kiam vi estas en puto."

Saĝul' cedis al ĉi cirkonstancoj:
Sentaŭgulo kun multe da ŝancoj.
Se al vi mankas akregaj ungoj
malmulte batalu kontraŭ mungoj.
Kiu kun fortbrakuloj kverelas
ties brako pro rompiĝo ŝvelas.
Hezitu ĝis kaptu lin la destin',
Do je l' san' de amikoj venĝu lin.

مردم آزاری را حکایت کنند که سنگی بر سر صالحی زد. درویش را مجال انتقام نبود سنگ را نگاه همی داشت تا زمانی که مَلِک را بر آن لشکری خشم آمد و در چاه کرد. درویش اندر آمد و سنگ در سرش کوفت. گفتا تو کیستی و مرا این سنگ چرا زدی؟ گفت من فلانم و این همان سنگ است که در فلان تاریخ بر سر من زدی. گفت چندین روزگار کجا بودی؟ گفت از جاهت اندیشه همی کردم اکنون که در چاهت دیده فرصت غنیمت دانستم.

ناسزایی را که بینی بخت یار — عاقلان تسلیم کردند اختیار
چون نداری ناخن درنده تیز — با ددان آن به که کم‌گیری ستیز
هرکه با پولاد بازو پنجه کرد — ساعد مسکین خود را رنجه کرد
باش تا دستش ببندد روزگار — پس بکام دوستان مغزش برآر

***

Rakonto 2

Misvoĉulo legis la Koranon laŭte. Sciulo preterpasis kaj diris: "Kiom estas via monata salajro?" Li respondis: "Neniom." Li demandis: "Kial do vi penigas vin tiel?" Li respondis: "Pro Dio mi legas." Li diris: "Pro Dio ne legu."

Se tiel vi laŭtlegos la Koranon,
Vi fifamigos ĉiun islamanon.

ناخوش آوازی به بانگ بلند قرآن همی خواند. صاحبدلی بر او بگذشت گفت: ترا مشاهره چند است؟ گفت: هیچ. گفت: پس این زحمت خود چندین چرا همی دهی؟ گفت: از بهر خدا می‌خوانم. گفت: از بهر خدا مخوان.

گر تو قرآن بدین نمط خوانی — ببری رونق مسلمانی

***

Rakonto 3

En la maŭzoleo de Johano, saluton al li, mi estis en la urbo Damasko, kiam araba reĝo fifama je maljusteco hazarde venis pilgrimi kaj preĝis kaj petis de Dio:

"Derviŝ' kaj riĉul' ĉe Dio samkondiĉas,
Por pli-riĉuloj ĉio pli malsufiĉas."

Poste li diris min: "Laŭ derviŝa modesteco kaj honesteco dediĉu maksimon al mi ĉar mi timas de grava malamiko." Mi diris: "Al malforta subulo faru favoron por ke forta malamiko ne kaŭzu doloron."

بر بالین تربت یحیی پیامبر علیه سلام معتکف بودم در جامع دمشق که یکی از ملوک عرب که به بی‌انصافی منصوب بود اتفاقاً به زیارت آمد و نماز و دعا کرد و حاجت خواست.

درویش و غنی بنده این خاک درند و آنان که غنی‌ترند محتاج‌ترند

آنگه مرا گفت: از آنجا که همت درویشان است و صدق معاملت ایشان، خاطری همراه من کنند که از دشمنی صعب اندیشناکم. گفتمش: بر رعیت ضعیف رحمت کن تا از دشمن قوی زحمت نبینی.

Se vi havas fortajn brakojn kaj manojn
eraras rompo de malfortul-brako.
Ĉu rigidul' al subuloj ne timas
ne trovi helpanton per tia ago.
Semi malbonon kaj atendi bonon
estas vana penso kaj nur imago.
Ŝtopilon eloreligu kaj justu,
Alie, iam estos justo-tago

به بازوان توانا و قوت سردست خطاست پنجه مسکین ناتوان بشکست
نترسد آنکه برافتادگان نبخشاید که گر ز پای درآید کسش نگیرد دست
هرآنکه تخم بدی کاشت وچشم نیکی داشت دماغ بیهوده پخت و خیال باطل بست
زگوش پنبه برون آر و داد خلق بده و گر تومی ندهی داد روز دادی هست

Adamidoj estas ja korpo-organoj
kiuj laŭkree estas samesencanoj.
Kiam organon dolorigas la sorto
restas por aliaj nenia komforto.
Vi, kiu pro alies malĝoj' ne tristas,
Nomiĝi homo vi certe ne meritas.

بنی آدم اعضای یکدیگرند که درآفرینش زیک گوهرند
چوعضوی بدرد آورد روزگار دگرعضوها را نماند قرار
تو کز محنت دیگران بی غمی نشاید که نامت نهند آدمی

***

Rakonto 4

Sciulon oni demandis: "Inter malavareco kaj braveco kiu pli bonas?" Li respondis: "Ne gravas se malavara ne bravas."

Ne restos Hatam de Tajo[1] por ĉiam
sed restos eterne liaj nom' kaj fam'.
Pagu vian Zakat-on[2] ĉar la herbojn
se ĝardenist' stucas, pliiĝas sezam'.
"Donema man' pli bonas ol forta brak'"
estas skulptite sur l' tombo de Bahram[3].

حکیمی را پرسیدند: از سخاوت و شجاعت کدام بهتر است؟ گفت: آنکه را سخاوت است به شجاعت حاجت نیست.

نماند حاتم طایی ولیک تا به ابد بماند نام بلندش بنیکوی مشهور
زکات مال بدر کن که فضله رز را چو باغبان بزند بیشتر دهد انگور
نبشته است برگور بهرام گور که دست کرم به زبازوی زور

***

Notoj:

1- Hatam de Tajo estis homo fama pro sia donacemo (Tajo estis la nomo de tribo).
2- Zakat estas monsumo kion en islamo oni devas pagi religie pro Dio.
3- Bahram la 5-a, estis antikva persa reĝo de sasanida dinastio (226-636 p.K.) fama pro inklino al zebro-ĉasado.

La verdujo

Feliĉa kiel verdaĵo vojaĝi al verdujo,
venu esti printempa!
kiel verdpensulo!
al Esperantujo!

خوشا چو سبزینه
سفر به سبزستان
بیا بهاری شو!
بیا چو سبزاندیش!
به اسپرانتستان!

Min vidu
ke se ne estus viaj okuloj
mi ne havus eĉ stelon
en la sep-ĉieloj!

مرا ببین!
که اگر چشمان تو نبود
در هفت آسمان
یک ستاره هم نداشتم

La enhavo de letero al nubeto
de fame konata urbego:
"refoje pluvon sendu "!

متن یک نامه به ابر
از سوی شهر شهیر:
"باز باران بفرست"!

De (s-ro) Hosejn Alizade

حسین علیزاده

Metodo por maldikiĝi!



Kelkaj kompatuloj, post longegaj esploradoj, senĉesaj serĉadoj pri maldikigo, finfine trovis iun strangan sed efikan metodon, kio ĝis nun estas la plej utila inter la aliaj.
Do, se vi ŝatas maldikigi vin tre rapide, svatu fraŭlinon.

Nur per iu simpla kalkulado, vi tuj povas kalkuli ke dum svatado, kiom da pezo oni perdos:

1) Pensado pri svat-propono perdigos almenaŭ 250 gramojn de vi.
2) Malpliigo de pezo, nur pro tio, ke pruntitaj kostumoj estu vesteblaj, 3 kilogramojn.
3) Salutado al la patro, patrino kaj gefratoj de la fraŭlino, perdigos 300 gramojn.
4) Depreno de teo el la pleto kaj rigardo al la fraŭlino:
   a) Se la teo verŝiĝu surteren, 500 gramojn.
   b) Se la teo ne verŝiĝu sur la teron, perdigos almenaŭ 3 kilogramojn.
5) Negativaj respondoj al la patro de fraŭlino, rilate al propra hejmo, aŭto, regulara profesio kaj posedado de la vilao, perdigos 4/180 kilogramojn
6) Atingo al nepozitiva respondo flanke de la fraŭlina familio, kiu dependas de sintenado de la personoj, perdigos pezon inter 5 gramoj ĝis 5 kilogramoj.

Kaj nun la morala rezulto: Nun vi mem juĝu ke kial *Farhad*, anstataŭ svati sian amatinon (*Ŝirin*), preferis fuĝi al montaro kaj haki ŝtonojn.

Tradukita per **Lumina E.**

Fonto:
Salnameje Golagha (Golaga Jarlibro)**,** Ali Zaranduz, Iliustria Jarraporto, 1381,Tehrano, 12-a jaro**.**

Sur miaj ŝultroj	**روی شانه‌های من**
Sidas papilio	**شاپرک نشسته است**
Rigardas vin, miaj lacaj ŝultroj	**شانه‌های خسته‌ام ترا نگاه می‌کنند**
Direkto de viaj okuloj	**امتداد چشم‌های تو**
Ĝis ĉirkaŭaĵo de	**تا حوالیِ**
Ĉiuj kurieretoj	**هرچه قاصدک،**
Ŝmiras la kolirion	**سرمه می‌کشند.**
Apud la fenestro	**پای پنجره**
Vi eltiras la kurtenon	**پرده را کنار می‌زنی**
Subite	**ناگهان**
-O, mia Dio –	**- خدای من -**
La ĉielo, pleniĝas je vi.	**آسمان پر از تو می‌شود**
(s-ro) Golam Reza Zolfagarnija - Ĉaluso	غلامرضا ذوالفقارنیا – چالوس

Rakonto

Oni rakontas, ke unu el la granduloj de la familio de Bujoj malsaniĝis kaj deliris. Li ekkris senĉese kaj imagis ke li estas bovo kaj nenion manĝis dirante: “Mortigu min!”. Aviceno (980-1037 p.K.), decidis kuraci lin, dironte al li ke la buĉisto estas preta por mortigi lin.

Aviceno tuŝis la flankon de la “bovo” plendante: “Kia maldika bovo?! Manĝigu al li herbojn dum kelkaj tagoj, ĝis kiam li grasiĝos. Momente mi ne volas mortigi lin”. Poste oni povis doni al la melankoliulo sanigajn herbojn medikamente. Li saniĝis.

Rezultato de tiu ĉi rakonto: Aviceno povis ŝanĝi la pensmanieron de la malsanulo, kiu imagis, ke li estas bovo.

Tradukis: d-ro **Hejdar Raŝidi**

Fonto: Nezami Aruzi, *Ĉahar Magale* (Kvar Artikoloj)

Krokodilaj larmoj

Mi volas rakonti historion kiun mi vidis en televidilo dum mia infaneco. La temo estis pri hipokritulo kiu penadas trompi aliajn por atingi siajn malpurajn celojn.

Krokodilo vivis en rivero proksime al belega arbaro. Ĉiam la korkodilo penadis trovi vojon por kapti bestojn de la arbaro. Iun tagon ĝi estis malsatega kaj ne povis trovi ion por manĝi. Finfine, la krokodilo pensis pri solvo. Subite ĝi ekploregis kaj larmojn fluis el siaj okuloj kiel pluvo. Tiam aliaj bestoj aŭdis la senpovan krokodilon plori.
Ili demandis “Kial vi ploras, sinjoro krokodilo?”

La krokodilo respondis: "Miaj dentoj min ekdoloras hodiaŭ" kaj mi mem ne kapablas purigi ilin. Ĉu vi povas helpi min miaj geamikoj?”

Tiel same la larmoj forte fluaadis el ĝiaj okuloj. Kelkaj da afablaj birdoj kompatis ĝin. Tial ili decidis helpi la krokodilon kaj petis ĝin malfermi la buŝon tute. La birdoj eniris la buŝon de la krokodilo kaj komencis purigi ĝiajn dentojn per siaj bekoj. Subite la malbonkora bestego ekfermis sian buŝon kaj ekmanĝis la kompatindajn birdojn. Post kelkaj tagoj, unu el dentoj de la krokodilo vere forte doloris kaj ĝi plorinte eliris la riveron por peti helpon, sed neniu kredis ĝiajn larmojn ĉi foje. Do, ili ne plu helpis la krokodilon kaj ili forlasis ĝin en vera dolorego.

Ali Purdehgan – (komencanto) Tabrizo



Nenio Grava

Lumina E.

-Fereŝte! Iom malrapide marŝu, mi petas…
-Ho! Dio mia! Kion vi volas de mi? Kial vi ne lasas min sola? Ĉu mi ne diris al vi ke mi jam eldiris al ili mian finan decidon? … Mi ĵus forlasis Haĝian domon. Fine mi diris al lia patrino ke venu ĉe nin en Fetr-festo…
-Fereŝte!? Frenezulino! Kion vi faris!? Ĉu vi fartas sane? Diru al mi kial vi ne serioze pensas pri via vivo, sorto, futuro? Kial vi volas mem malfeliĉigi vin? Vi mem bone scias kiom bela vi estas kaj ĉiuj niaj parencaj fraŭloj kore deziras kapti vin kiel sian edzinon, do nun kial vi volas akcepti edziniĝ-proponon de Haĝi, kiu krom vi, kiel sian futuran fiksedzinon, havas multajn edzinojn? … Kial vi ne komprenas la staton? Vi jam havas tre bonajn kondiĉojn por ke gravuloj proponu al vi geedziĝon, do se vi iomete, nur iomete paciensu, ĉio enordiĝos kara mia fratino… Mi promesas al vi!
-Amir! Mi paciencu por ke kio okazu? Por ke nia panjo pro sia malsano kaj nia malriĉeco, irinte ĉe la forpasintan paĉjon karmemoran, forlasu nin por ĉiam? Amir? Ĉu vi vere forgesis ke la kuracisto kion rekomendis, ĉu vi ne memoras ke la kuracisto menciante danĝeron, kiu minacas la vivon de la panjo, avertis nin ke tre frue oni operaciu ŝin?
-Mi komprenas, mi bone komprenas kara! Tamen por kiom da prezo? Krome, kion vi diros al Said? De via infaneco, la onklino, vidis vin kiel sian bofilinon kaj vi bone scias ke Said tre amas vin.
-Ho! Dio mia! Ĉu vi finas la temon aŭ ne? Mi promesis nek al Said nek al onklino, do nek vi plu ĝenu min kaj lasu min kun miaj kor-doloroj… Said ĝis venonta jaro finos sian studadon universitate kaj kaptinte la oficon, mi certas ke lia stato ege boniĝos kaj tiam multaj fraŭlinoj deziros lin kiel sian edzon, kaj tiam li tuj forgesos ĉion…

Fereŝte kaŝante sian vizaĝon, kolektas siajn larmojn per la kaptuko…

-Amir! Malfermu la pordon, mi ne kunhavas mian ŝlosilon.
-Bone, tamen aŭskultu min nur momente… Fereŝte! Ĝis nun mi ne volis ion diri pri tio, kion mi jam scias kaj vi ankoraŭ ne scias. Mi certas ke se vi konsciu tion, vi tuj nuligos ilian proponon .

Trapasante la koridoron al korto, ili ekvidas du dikajn ŝafojn, kiuj manĝas legomojn. Pripensante la kaŭzojn por ekzisto de ili tie, Ali, la plej malgranda frato, kun nova bicikleto sonorante la sonorilon aperiĝas…

-Ali? De kie vin atingis la biciklo? Kiu alportis tiujn ĉi ŝafojn?
-Ne maltrankviliĝu franjo! Ĉio estas por ni mem. Ĵus Haĝi estis ĉi tie kaj li alportis ilin. Li rakontis al panjo ke lia patrino telefone klarigis ke vi jam akceptis lian geedziĝan proponon. Kaj, krom tio ĉi, li donis ankaŭ al Amir tiun ĉi pakaĵon. Jen ĝi … Fraĉjo! Ankaŭ vi havas specialan donacon de li, sed mi ne scias ĝuste kio ĝi estas, ĉar panjo ne permesis min malfermi ĝin. Sed ĝia kovrilo aspektas tre bele. Mi ege deziras ekvidi ĝin …
-Kie estas la panjo Ali?
-Ŝi kuŝas en sia lito. Sed mi ne scias kial de tiam, kiam Haĝi forlasis nin, ŝi ploradas. Franjo? Eble pro tio, ke Haĝi donacis nenion al panjo, ŝi ploras? …Sed ne, ne estas tiel, ĉar eĉ post kiam mi donis al ŝi mian aŭton, ŝi ankoraŭ daŭrigis la ploradon???
-Mi ne scias, mi ne scias, eble pro tio, ke la panjo ne ŝatas ludilon… Do nun bonvole daŭrigu vian ludadon kaj lasu nin solaj, ĉu bone?
-Bone, franjo!
-Nu Amir, nun rakontu por mi. Kion vi scias kiun mi ne scias pri Haĝi?

Amir, kalkulante la donacitajn paper-monojn, sen rigardo al okuloj de Freŝte, mallaŭte respondis:

-Nenion kara, ne estis io grava. Nur diru al mi, kiam enordiĝos la afero kaj kiam okazos via geedziĝfesto? ★

Virina tribuno:

Ĉiuj parolas pri niaj rajtoj

Ni havas vojon alt-malalt-plenan antaŭ ni. La leĝoj estas kontraŭ ni. Lasta-nokte amikino diris: "La sociaj problemoj de la virinoj ne dependas de ni ĝis kiam ĉiu movado aŭ aktivado volontula interpretiĝas kiel konspiro. Vi estas aŭ senlabora aŭ malsana estiganta problemon por vi".

Kvankam mi replikis ŝin, sed iam sub la premado de tiaj vortoj kaj paroloj mi sentas en mi malsanon.

Fakte en nia lando la leĝoj estas faritaj tute virece. Ni ne povas vojaĝi, se ni ne havas skribitan permeson. Ni ne povas labori, se la viro ne bontrovas ĝin por la familio. Ni ne povas daŭrigi la studadon se la viro ne estas kontenta pri tio kaj perforton ni akceptas, ĉar la perforto ne estas riproĉata en la socio. Se ni estas sub la perforto, ni ne povas hejmon forlasi, ĉar alia hejmo imuna ne troviĝas por ni kaj oni nomas nin edzino malobeema.



Ĉie oni parolas pri niaj rajtoj, omaĝe al ni okazigas ceremoniojn, kvankam la loko de nia homa rajto nek en la privata nek en la publika medioj estas priskribitaj.

En la kuratorema sistemo oni ne havas alternativon krom akcepti la kuratorecon, kiun la administrantoj de la kulturaj kaj la virinaj aferoj kaj la aliaj, determinas kiel tasko por la alia duono de la socio.

Grandega budĝeto konsumiĝas pri la admonado de la virinoj anstataŭ por iliaj diversaj problemoj.

Juĝrajto, rajto de prezidenteco kaj multaj aliaj sociaj rajtoj, inter ili pli grave vartado de la infanoj post la divorco estas en la dispono de la viro. La virinoj ne havas porcion el la meza kaj supera direkcio en la administra kaj politika sistemoj de la lando kaj nur en la trunko sen ebleco progresi baraktas kaj sin batas kontraŭ la muro glasa.

Ili ne havas porcion el la mono kaj riĉaĵo kaj pro tio ne kapablas organizi grupojn kaj organizojn, kiujn ili fondas kaj poste en juĝo senkompata pro la manko de iloj kaj loĝistiko kaj necesa subteno nomiĝas nekapablaj kaj sentaŭgaj en administrado aŭ ĉia ŝanĝado.

Eĉ kiam ili parolas pri la rajtoj precizigitaj en la leĝo kaj religio kiel posedrajto aŭ studarajto kaj laŭvola elektado de la edzo, akiri tiujn, tradicie elpreniĝas mallaŭdinda aŭ senvalora kaj ekster la digno de la virina karaktero.

Nia amikino la veron diris ke: "Mi miras pri via pacienco! Kiam vi povas esti patrinoj bonaj kaj oferemaj, anstataŭ perdi la tempon kaj nervojn en tiaj-ĉi grupoj kaj sociaj aktivadoj, kiuj ne materian profiton alportas, sidu hejme, ripozu, sportu, iru naĝejon, ornamu manĝotukon kaj mastrumadu kaj atendu ĝis la nokto por la alveno de la edzo por diri al li: 'ne estu laca' mono bezonata por morgaŭaj elspezoj ankaŭ estas preta sur la breto!"

Mi devas konfesi, ke la plej grava deziro de la virinoj estas tio, ke la socia kredo scius la virinojn homoj perfktaj. La kredo de neceso kaj ne de devigo, por ke ebligus ŝanĝi la publikan opinion pri la virino bona kaj sindona. La atestoj historiaj jam montris bone, ke kiam la virinoj volis, ili povis per eblecoj minimumaj estigi fundamentajn ŝanĝojn en siaj situacioj. Kiam ili decidis publikigi la studadon por la virinoj, la atribuitan akuzon kaj anatemon ili volonte akceptis kaj ne timis de ties kontraŭreligiaj akuzoj pri la afero, kiu estis ordonita eĉ necesa en la religio kaj preterpasis individuojn, kiuj pro siaj privataj utiloj jam ŝirmis sin en la tranĉeoj religiaj.



Hodiaŭ la blasfema bazaro estas tre varmega. ★

Verkisto: S-ino Fariba Sadat Davudi Mohaĝer
Traduis: F-ino M. Fahmi

Kie vi estas? Kion vi faras?

Lastatempe oni trovis spurojn de Hirkani- aŭ Kaspi-tigro inter landlimoj de Turkio kaj Irako. La precizan lokon scias nur la eŭropaj sciencistoj, kiuj jam modlis la tigran piedsignon kaj priserĉadas ĝin.

Kie vi estas? Kion vi faras? Tiom fore, inter montetoj, kanejoj, kamparoj? Ho vi la sundresito, kion vi faras tie?
Kion faris al vi la sorto? Kion faras vi kun la sorto? Longajn jarjon vi estis forgesita.

Laŭdire vi estas, vi ekzistas, sed kie? La suno estas kaj vi ne estas, viajn piedsignojn prunteprenis jam via patrino, la tero.

Oni jam trovis vin per signoj viaj. Ĉu vi havas adreson?! Serpentoj estas kaj vi ne estas. Palmoj estas kaj vi ne estas. Kie vi estas? Estu singardema, oni jam venis prizorgi vin.
La generacio hodiaŭa ne estas tia, kian vi pensas.

La generacio hodiaŭa estas fiaskulo, pasint-sopiranto, pasint-amanto, estas pentema, modesta pri si, pri prauloj siaj.
La homo eraris. Sur vian imponecon ruĝstrekis li en la naturo, faris malsaĝon, faris frenezaĵon. Plu mortigi vin kian utilon alportis al li?

Li volis elmontri sin potenca. Kiom malforta estis li. Li impertinentis. Vi scias la homo estas impertinenta kaj perfortas. Li volas alproprigi ĉion al si, tiam ilin li perdas. Li volis ŝajnigi sin forta. La naturo forprenis de li la forton. Vi scias la potenco estas en la naturo, potenco estas en vi, en via kreinto, kiu vin kreis kun tiom da forto, kun tiom da grandeco, kun tiaj belaj sorĉantaj okuloj.

Li plumis sur vian haŭton la plej belajn desegnaĵojn kaj en viajn kriegojn, la plej profundajn sonojn. En viaj ungegoj evidentas la fingropinto de la naturo. Vi scias, ke la homo estas ĵaluza. Eĉ la naturamantoj estas tiaj. La homo estas kaptito, kaptito de siaj frenezaĵoj, sed vi estas libera. Kie vi estas?
La nordo soifas aŭdi vian blekegon. Miankale[1] estas senpacienca, maltrankvila. Kie estas vi, la arbaro-gardisto? Ho vi, la sovaĝa reĝo? Lilio sen vi funebras. Lilio ankaŭ iom post iom perdiĝas el la memoroj. Kie estas vi?


Blekegu. Ho vi la tondro perdita en la ĉielo.

Ĉu vi memoras, kiam tondris, vi blekadis kaj viaj voĉoj en si amasigis ĉiujn tondrojn?
Kie vi estas? En via foresto oni disŝiris jam Alborzon[2].

Arbaro sen vi estas sensignifa. De post vi la krudvoĉo de sigeloj kiuj senpripense celumis kaj celumas la arbojn anstataŭigis viajn blekegojn. De vi nek paŝo nek nomo plu ekzistas. Viaj paŝoj en la arbaro estis espero. Nun tiuj ĉi paŝoj en la arbaro estas perditaj. Anstataŭigis ilin la piedsignoj de homaj botoj, kiuj en via foresto disrabas vian neston, vian loĝejon.

Kie estas vi? Kanejoj vokas vin. Kanejoj estis ejoj trankviligaj por viaj idoj. Kanejoj sopiras vin. Kanejoj estas solaj.
Vere el kiu regiono vi estas? Vi, kiu laŭdire nun estas aperinta ie ĉi-proksime, de kie vi venas?

Tiuj, kiuj petante la naturon postsekvas vin kaj vian eston deziras, diras, eble vi, ke, kelktage aŭdeblas viaj piedsignoj, via viveco, eblus esti el Irano, el Hirkano[3] .
De kie vi venas, ho malnova forkurinto kaj forfuĝinto.



Laŭdire oni jam trovis vin ĉe la limo inter Turkujo kaj Irako. Oni ne vidis vin. Restas signoj viaj. Prave ili ne vidis vin, prave vi plu ne elmontris vian grandecon, imponecon. Vi pravas! Ah se tiu raporto estus ĝusta. Oni diras tiu estas ĝusta.

Estas fidinde. Grupo da esploristoj, grupo samgeneracia kun tiuj ĉi homoj pentintaj akiris jam atestojn pri vi.

Oni diras ke vi vidiĝis jam en la militista regiono. Kion faras vi tie? ho vi grandulo impona! Kial tie?

Verkis s-ino **Homejra Moheb-ali**
Tradukis f-ino **M. Fahmi**

IREA-Informilo

N-ro 2, 1 marto 2005

Jara IREA-Raporto

Partopreni festivalgazetaron same kiel antaŭa jaro (6a – 13a marto 2004). Dume prezenti la revuon "IRANA ESPERANTISTO" kaj pludiskonigi Esperanton kiel la plej facilan lingvon. Verŝajne tio bone impresis la publikon.

Sukceso en UK Pekino, konvinki UEA-estraron por akcepti aktivulojn de la projekto "Lingvo de paco", s-ro Said Borhani, la ĉefmotoro de la projekto en Maŝhado kaj f-ino Diana Karimi, afganino kaj iniciatorino de AFESPO, ke ili partoprenu en la UK. Aliflanke en la belartaj konkursoj por unua fojo irana esperantisto d-ro Kejhan Sajjadpur, unu el redakcianoj de "Irana Esperantisto", gajnis la premion "Nova Talento".

IRLEI aktivas. Irana ligo de E-aj instruistoj senĉese okazigas kursojn ekde sia naskiĝo ĝis nun: korespondajn kursojn tra la lando kaj aliaj kursojn bazajn kaj meznivelajn en Tehrano konstante. En Maŝhado la studentoj de Ferdoŭsi-universitato laŭ gvidado de s-ro Vahid Partovinia kaj f-ino Nafise Ŝariati gvidas tiujn kursojn. Babolsar ne silentas kaj E-aj kursoj okazas en Mazandaran-universitato per prof-ino Karimi kaj ankaŭ en Babolsar kursojn gvidas s-ro Azarhuŝang. Ankaŭ en infanĝardeno ili por infanoj aranĝis facilan kurson. En Ŝirazo, en la neŝtata Islama Azad-universitato, la studenta grupo de Aftab (sunlumo) okazigas kursojn. Entute E-o en oriento de Irano tiel aktivis kiel nun ĝi transiris al Afganujo tre brile kaj tie renkontiĝis bonvene kaj nun Afgania Asocio aktivas entuziasme eĉ en siaj universitatoj. E-o instruado iom post iom deziras kovri la tutan regionon.

La alia okazo: partopreni en Armenia Esperanta Renkontiĝo. 11 iranaj e-istoj vojaĝis tiun landon kaj tre bonan kaj utilan tempon pasigis tie.

Esperanta movado grave paŝis al pli organizita kaj strukturita agado en Irano. La membroj de Irana E-Asocio voĉdonis al kandidatoj de la komitato. 6 personoj elektiĝis: D-ino Ŝirin Ahmadnia, S-ro Said Borhani, F-ino Najjereh Ebrahimpur, S-ino Fariba N. Maĝd, D-ro Kejhan Sajjadpur, S-ro Reza Torabi. Kaj la estraranoj: Inĝ A.R. Mamduhi (prez.), Inĝ. H. Ŝafii (vic-prez. kaj kasisto), F-ino S. Emrani (ĝenaerala sek.). Estis decidite ke IREA aliĝu al UEA kiel landa asocio. Tiucele post unuaj kontaktoj jam estas senditaj la oficialaj dokumentoj. Espereble Irana Esperanto-Asocio akceptiĝos kiel la landa asocio de UEA dum UK 2005 en kiu iranaj partoprenantoj atingos novan rekordon de eble pli ol 25 personoj.

La 15an de decembro, la internacia tago de Esperanta Libro, la Tago de Zamenhof: laŭ la propono de samideano Ŝahram Hasanzade en unu el nordaj urboj nomata Raŝt seminario okazis tie. Kelkaj el movadanoj pri diversaj aspektoj de Espernato parolis: Kio estas Esperanto? Esperanto kaj literaturo. La historio de Esperanto kaj aktivado de instituto "Sabzandiŝan" – persa nomo de Irana Esperano-Centro - ktp. Vizitado de E-a ekspozicio, kaj ankaŭ skeĉo dulingva estis la programoj preparitaj por tiu tago.

IREJO reaktiviĝas. La gejunuloj de tiu barnĉo kun bonaj esperoj komencis sian agadon. Unu el iliaj agadoj estis partopreni en Tago de arboplantado la 11an de Marto. Multaj geesperantistoj kun siaj parencoj en tiu tago ĉiuj kune kun aliaj interesitoj multajn arbojn plantis. Espeantistoj ne nur verde pensas sed verde plantas kaj ankaŭ verde mem kreskas.

El aliaj landoj, turistaj kaj neturistaj esperantistoj venis al Irano kaj vizitis la vastan landan diverscele el Serbio, Japanio. Pollando, Usono kaj tio en la nova jaro laŭ antaŭreklamo daŭros.

Rilate al E-aj libroj kaj lernolibroj kiuj delonge komenciĝis verkiĝi, ili estas pretaj kaj en jaro 2005 jaro eble eĉ kvar el ili samtempe aperos. La revuo "Irana Espernatisto" estis prezentita en UK Pekino kaj ĝi sin prezentos en UK 2005. La enlandaj abonantoj kaj eksterlandaj pli kaj pli aldoniĝas. Estas rimarkinde ke la redakcianoj volonte kaj sindoneme laboras por siaj grandaj movadaj celoj. ★

IRANA ESPERANTISTO



"...bonŝance venis
"IRANA ESPERANTISTO",
kiu diversnuance kaj riĉe proksimigas la kulturon de tiu ĉi fora lando. Jen per prezento de la materia kulturmonumento de tiu ĉi lando, granda turisma atrakciaĵo devenanta el la 10-a jarcento Bam-Citadelo, la plej granda adoba kontruaĵo en la mondo, kalkulita de UNESCO al la universala kulturheredaĵo..."
Radio Polonia, Barbara Pietrzak.

IRANA ESPERANTISTO estas internacia kultura sezon-magazino sendependa. Legante ĝin vi povas:
Konatiĝi kaj kun plej grandaj antikvaj persaj poetoj/mistikuloj ...
Sciiĝi pri gravaj eventoj en Irano, ekz-e en la 5a n-ro estis pli ol dek paĝoj pri Ŝirin Ebadi, NobelPacPremiito en 2003.
Lerni pri plej allogaj vidindaj lokoj (historiaj); ĝis nun …
IRANA ESPERANTISTO aperas ĉiu-sezone sur 56 paĝoj, ĝi estas 29cmx20.5cm, kun koloraj kovrilpaĝoj, ISSN 1728-6174.

Pliaj informoj pri la magazino, kune kun enhavtabelo de 5-a n-ro alireblas en: http://eo.wikipedia.org/wiki/Irana_Esperantisto
Jen informfontoj pri la magazino en la persa: http://www.sabzandishan/com , http://www.magiran.com/subscription.asp?mgID=2899

Interesita? Jen la Abon-informoj:
Jara abontarifo por internacia samideanaro:
Orienta Eŭropo, Azio, Afriko, Sudameriko: 15 Eŭroj.
Okcidenta Eŭropo: 20 Eŭroj.
Nordameriko, Japanio, Koreio, Oceanio: 25 Eŭroj.
Vi povas pagi la abonkotizon aŭ/kaj subtensumon al UEA, kodo: **iece-h**.

Perantoj de *IRANA ESPERANTISTO*

Belgio:
FEL
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

POLLANDO:
Stanislaw Śmigielski
Ul. Krasickiego 12/6
PL-47-206 Kedzierzyn-Kozle

USONO:
Joel Brozovsky
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
1257 Hollis St
Emeryville CA 94608-2514, Usono
Por eventualaj legantoj en Usono: por la jaro 2005, la revuo "Irana Esperantisto" estas abonebla pere de la abonservo de ELNA (PO Box 1129, El
Cerrito CA 94530, tel +1 510 653 0998, retadreso: elna@esperanto-usa.org,
ttt-ejo: http://www.esperanto-usa.org kaj iru al "Books & Other Materials" kaj poste al "Subscriptions").

Perantoj estas bonvenaj en aliaj landoj!

Abonilo

Nomo: Familia Nomo: Aĝo: De kiu numero:
Ĝis kiu numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono: E-poŝto:

Sendu la abonilon al la suba adreso (irananoj sendu kune ankaŭ kopion de pagdokumento): Sabzandiŝan Instituto, P.O.Kesto 17765-184, Tehrano, Irano.
E-poŝto: info@sabzandishan.com
Bonan legadon,

Irana Esperantisto